

KOMPAR-STUDO

PRI

LA VERBOJ

**Precipaj diferencoj en la esprimo de la tempo
inter la franca lingvo kaj Esperanto**

(dua versio)

Christian Rivière

RESUMO

La franca lingvo kaj Esperanto proponas tre malsamajn rimedojn por esprimi agon sub formo de verbo. Tradukanto devas alfronti ambaŭ sistemojn samtempe (kaj por kompreno kaj por reesprimo de la originala teksto en la alia lingvo).

Ĉi tiu kompar-studo limiĝas al la problemo de la tempo. Ĝi do prezentas la diversajn modojn kaj tensojn uzeblajn ambaŭflanke, kaj pritraktas kelkajn kromajn punktojn kiel la rektecon de la esprimo, la relativecon de la tempo, la esprimon de antaŭeco.

La plej granda parto estas rezervita al la prezento de sesdeko da interesaj ekzemploj renkontitaj dum la tradukado de la verko de Delphine de Vigan « Les heures souterraines » / « La horoj subteraj ».

ENHAVO

	Paĝoj
1 <u>Enkonduko</u>	4
2 <u>Kelkaj rimarkoj pri la romano « Les heures souterraines »</u>	4
3 <u>Sintaksaj rimedoj uzataj por la esprimo de tempo</u>	5
4 <u>Prezento de la verbaj tempoj (tensoj) kaj modoj en la franca</u>	6
5 <u>Prezento de la verbaj tempoj kaj modoj en Esperanto</u>	8
6 <u>Komentoj</u>	9
7 <u>Tempo absoluta kaj tempo relativa</u>	9
8 <u>Formoj rekta, kvazaŭ-rekta, duon-rekta kaj nerekta</u>	11
9 <u>Esprimo de antaŭeco</u>	14
10 <u>Daŭro kaj rezulto</u>	15
11 <u>Kompleksaj formoj</u>	16
12 <u>Kutimaj eraroj far la franclingvanoj</u>	17
13 <u>Ekzemploj el la romano</u>	18
Apendico	47

1 Enkonduko

Fine de 2013, mi komencis la tradukadon de la romano “Les heures souterraines” (verkita de Delphine de Vigan kaj eldonita en 2009). Ĝin mi publikigis en septembro 2014^a sub la titolo “La horoj subteraj”.

Krom pro la kutimaj problemoj de tradukado (vort-provizo, propraj nomoj, ...), rapide evidentiĝis ke inter la sintaksaj problemoj, okupis la plej grandan spacon tiuj rilatantaj al la verbo-tempoj. Tie troviĝas preskaŭ kompleta panoramo de tiklaj situacioj koncerne la relativajn tempojn, la tensojn kaj la modojn.

Mi tiam konjektis ke tiu materialo povus esti interesa por komencantoj aŭ progresantoj. Mi devas rekoni ke eĉ post la eldono de la traduko, miaj pripensoj pri tiu parto de la gramatiko ne estis entute firmaj. Tio signifas ke plua serioza kompar-analizo estis necesa. Foje estis malfacile scii precize de kie venas problemoj, ĉu de la verko mem, ĉu de Esperanto, ĉu de la franca.

La verko estas destinita al larĝa publiko kaj la stilo estas flua. La historio estas parte mem-biografia, do la aŭtorino ne celis stilon aparte avangardan kaj ne uzis nekonatan vort-provizon. La temo rilatas al teknokrata labor-medio do neeviteble kelkaj esprimoj estas specifaj al tiu kunteksto. Tamen du fenomenoj intervenas en la fojfoja malfacilo decidi pri la verbo-tempoj. La unua rilatas al la tipe modern-stila malstrukturigo de multaj frazoj. La dua rilatas al la relative ofta uzo de la duon-rekta formo kaj eĉ de tio kion mi nomas la kvazaŭ-rekta formo. Tiuj du punktoj estas pritraktataj en la postaj paragrafoj.

Koncerne la du lingvojn, gravas noti ion : ili funkcias tre malsame koncerne la verbajn tensojn, tiagrade ke post skiza prezento de ambaŭ, estas evidente ke ne troveblas vera traduk-metodo por iri de unu lingvo al alia, kiu kovrus laŭregule la tuton de la renkonteblaj problemoj.

Post prezento kun mallonga analizo de la diversaj sciindaj punktoj, sekvas speco de katalogo de eltiraĵoj el la romano, kun po la franclingva kaj esperantlingva versioj, kaj kelkaj komentoj. Tiel la dokumento povos utili okaze de kurso aŭ de traduk-ateliero. Tiucele libera spaco inter du pecoj ebligis aldonon de mane skribitaj notoj.

2 Kelkaj rimarkoj pri la romano « Les heures souterraines »

Koncerne la specifajn problemojn de la fraz-aranĝoj, de la interpunkciado kaj de la verbotempoj, estas evidente ke de kelka tempo (ni diru de du ĝis tri jardekoj, sed la fenomeno estis verŝajne progresiva) la franca proza literaturo konsiderinde evoluis. Tio rimarkeblas ĉe majoritato de nunaj verkistoj, sendepende ĉu ili alverkas al larĝa publiko, ĉu al ŝatantoj de avangardaĵoj, aliflanke sendepende ĉu tiuj verkistoj estas profesie ne ankoraŭ konataj komencantoj, ĉu ili jam ricevis belan kolekton da literaturaj premioj.

Por karakterizi tiun evoluon, jen kelkaj kriterioj, kiuj evidente troviĝas en la romano de Delphine de Vigan :

Ĝenerale la frazoj estas mallongaj, eĉ kelkaj estas unuvortaj, kvankam tia ekstrema frazospeco estas malofta. La ritmo estas relative rapida, kvazaŭ por ilustrati la kuntekston mem (urba medio, trafiko sur la ŝoseo, sinsekvo de urĝ- Alvokoj, etoso de metrostacio, fluo de zorgoj kaj streĉaĵoj ĉiuspecaj, ...). Estas notinde ke, eĉ se relative malpli nete, tiu stila rapideco troviĝas en la romano ankaŭ ekster la urbaj kaj urĝaj situacioj.

La nocio frazo ofte havas tute alian difinon ol kutime. Multaj frazoj ne havas verbon. Sed kiu povas aserti ke esprimo de ideoj necese entenu verbon ? Ankaŭ la aliaj vortoj havas semantikan esencon kiu ja kapablas ilin esprimi (eĉ pli en Esperanto kies elementoj estas ĉiuj deriveblaj radikoj kun specifaj

senco). Krome en Esperanto, la finaĵo de verbo estas marko de ĝia tempo (tenso), sed la signifo de la ago estas entenata en la cetero de la verbo (sendepende ĉu tiu radiko estas semantike verba aŭ ne). Do la sintaksa neceso de verbo eble estas eĉ malpli sentebla en Esperanto ol en la franca.

En kelkaj sinsekvoj da tiaj frazetoj, iuj vortoj havas sintaksan rilaton inter si, eĉ kiam ili situas en malsamaj frazoj, kvazaŭ la frazo-sinsekvo estus entuta "frazo" laŭ la tradicia senco de tiu ĉi vorto. Plurfoje ekzemple, la rekta komplemento de verbo troviĝas en la posta frazo (tiajn strangaĵojn perfekte solvas la akuzativo en Esperanto), eĉ kromaj subjektoj de la verbo foje troviĝas en aparta frazo.

Okazas ke esprimo de kaŭzo, kaj respektive de konsekvenco, ne troviĝas en la samaj frazoj, eĉ kiam tiuj ĉi estas relative mallongaj. Pli ĝenerale okazas ke du propozicioj ligitaj per korelativo, subjunkcio aŭ konjunkcio ne troviĝas en la sama frazo.

Paradokse en kelkaj situacioj de la romano (la unua kunveno, la eniro en la metroon, la manĝo en la kantino, en iuj psikologie turmentaj momentoj, dum la preparado de la dungo-kunveno, ...) la frazoj fariĝas subite tre longaj, sed tiuj estas ĝenerale sinsekvoj de propozicioj ne ĉiam ligitaj inter si, simple disigitaj per komoj, tiel ke la ritmo restas same rapida kiel per mallongaj frazoj.

En la sama frazo foje kunestas formoj nerektaj, duon-rektaj kaj eĉ foje kvazaŭ-rektaj (vidu pri pli detalaj klarigoj poste), same kiel subite la verkisto transdonas la taskon paroli al la protagonisto aŭ enkarniĝe anstataŭus ŝin aŭ lin (eble temas pri natura inklinado en la mem-biografia parto de la romano).

Fine, la jena rimarko koncernas pli specife "La horoj subteraj"-n. Temas pri preskaŭ senĉesa irreiro, de alineo al alia, kaj al la preterito kaj al la prezenco (sed ene de alineo la absoluta tempo estas unuforma). La leganto estas alterne lokita jen en la rakontita momento, kiel atestanto de la faktoj, jen en la rakontanta momento, kiel atestanto de la rezulto de tiuj okazintaĵoj.

Sinteze, ĉiuj tiuj malfacilaĵoj renkontitaj en la tradukado rilatas aŭ al la elekto de la trafa tempo (absoluta aŭ relativa) okaze de nereкта aŭ duon-rekta formo, aŭ al la detekto de kvazaŭ-rekta formo, aŭ al esprimo de antaŭeco. Tute same tiuj problemoj neprigas ne nur la precizan komprenon de la originala teksto, sed ankaŭ antaŭ-analizon de la intencoj de la aŭtoro, interalie kiam la frazo estas (ĉu intence ĉu ne) ambigua aŭ nepreciza.

3 Sintaksaj rimedoj uzataj por la esprimo de tempo

Ĉi tiu ĉapitro pritraktas pli precize la situigon en la tempo (ĉu absoluta ĉu relativa). Aliaj tempaj konsideroj (daŭro, ripetado, ...) estos prezentitaj poste.

La plej universala rimedo por situigi okazaĵon en la tempo konsistas en uzo de adverbo. La adverbo povas preni diversajn formojn :

- . ununura vorto : « baldaŭ / bientôt », « jam / déjà », « hieraŭ / hier », « ĉiam / toujours », « poste / après » ;
- . akuzativan formon : « matenon / le matin », « sabaton / le samedi » ;
- . vorto-grupo kun prepozicio kaj substantivo : « post tio / après cela », « ĉe la komenco / au début », « dum la manĝo / pendant le repas » ;
- . vorto-grupo kun adverbo kaj ĝia komplemento : « okaze de la jula festo / à l'occasion de Noël » ;
- . propozicio enkondukata de "kiam", "dum", "ĝis", "antaŭ ol", "post (ol)" : « kiam ne mankos la tempo / quand j'aurai le temps », « kiam mi fariĝis dekjara / quand j'ai eu dix ans », « dum li dormas / lorsqu'il dort », « antaŭ ol ŝi dormas / avant qu'elle dorme ».

Sintakse, adverbo rilatas nature al verbo, sed ankaŭ al adjektivo, al alia adverbo, eventuale al la subjekto de verbo (almenaŭ la aktivaj kaj pasivaj formoj en Esperanto). Kaze de tempa (aŭ loka) adverbo, tiu volonte rilatas al tuta propozicio aŭ eĉ al la tuta frazo. Krom pro stilaj konsideroj, ĝi do lokiĝas relative libere en la frazo.

Variantoj de adverba rimedo troveblas interalie en orient-aziaj lingvoj, pli forte ligite al la verbo, ĉu antaŭ ĝi, ĉu poste. Kelkaj ekzemploj :

Indoneza : *akan* por la futuro lokiĝas antaŭ la verbo aŭ adjektivo ; *mau* por proksima futuro (*mau* = *voli* *)

Ĉina : 要(*yào*), la plej uzata por la futuro, signifas ankaŭ "voli*". Ĝi indikas proksiman futuron.

Japana : ne ekzistas futura formo, sed je supozo senco だろ (darou) estas metita post verbo kaj esprimas kvazaŭ-futuron. Preterito : た(*ta*) aŭ だ(*da*) estas metitaj post verbo.

En la franca, same kiel en multaj aliaj lingvoj, aldoniĝas du aliaj rimedoj :

. la helpverboj ĉu « avoir », « être » sekvataj de participo, ĉu « venir de », « être en train de », « être sur le point de », ... sekvataj de infinitivo ;

. la konjugacio : indiko de tempo (tensoj) sub formo tre forte ligita al la verbo. Plej gravas noti ke tiu ĉi lasta rimedo estas **absolute devigata kaj precipa** (en la franca, sed tute ne konata ekzemple en la ĉina), kvankam ĝi evidente estas la malplej natura. Efektive, tiel forte ligi la tempon al la verbo (do al la esprimo de ago), prefere al la loko aŭ la maniero, aspektas iom arbitre.

En Esperanto, la funkciado ŝajne pli similas al la aziaj lingvoj, kvankam fine de la verboj ("is", "as", "os", "us", "u"). La morfologia simileco kun la franca (interalie) estas nur ŝajniga. La du partoj estas nete distingeblaj kaj iliaj semantikaj roloj ja apartigeblaj. La unua parto esprimas agon kaj la dua parto dise-siaflanke esprimas tempan ideon.

Noto * : La analogo kun la volitivo de Esperanto estas okulfrapa, des pli ke la volitivo ĝuste estas speco de baldaŭa futuro esprimanta la volon. Krome, la volitivo estas tenso aparta en Esperanto, pro du kialoj :

. la radiko "u" havas signifon apenaŭ ligitan al la tempo ;

. ĝi estas uzata ekskluzive kiel relativa tempo (formo rekta aŭ nereakta).

4 Prezento de la verbaj tempoj (tensoj) kaj modoj en la franca

Indikativo, kondicionalo, subjunktivo kaj imperativo estas modoj. Participo kaj infinitivo estas modaloj.

Ĉiuj modoj havas plurajn tensojn kiuj artikiĝas ĉirkaŭ tri tempoj (situo en la tempo : ĉu nuna, ĉu posta, ĉu antaŭa) :

Prezenco (présent)

Futuro (futur)

Preterito (passé)

La diversaj formoj de tiuj tensoj estas :

simplaj (unuvertaj),

kompleksaj (*simbolo #*), uzante unu el la help-verboj « être » (« esti ») aŭ « avoir » (« havi »),

super-kompleksajn (*simbolo ##*), uzante du help-verbojn sinsekve*.

La elekto de la help-verbo dependas pli-malpli de la transitiveco de la verbo. Sed tiu regulo suferas tiom da esceptoj, ke momente ne utilas diri pli pri tio.

Ekzistas ankaŭ aliaj kromaj help-verboj. La plej konataj estas : « aller » (« tuji », laŭvorte « iri ») por proksima futuro, « venir de » (« ĵusi », laŭvorte « deveni ») por proksima preterito, « être en train de » (« dumi », laŭvorte « esti sur la vojo al »). Ankaŭ ekzistas « devoir », « être en passe de », « se mettre à », ...

La indikativo esprimas ideon certan aŭ tiel konsideratan. La diversaj tensoj estas :

Prezenco / Présent : ago nuna aŭ regule farata ; fakto ĝenerala kaj ekstertempa ; ankaŭ uzata por rakonti ion en la estinteco (prezenco de rakonto).

Simpla preterito / Passé simple : ago nedaŭra aŭ neregula en la estinteco ; uzata en literaturo, eĉ malpli kaj malpli en la moderna literaturo kaj nun ĝin anstataŭas plej ofte la perfekto aŭ la pluskvamperfekto *.

Perfekto / Passé composé (perfekta preterito) : ago nedaŭra (kaj ofte izolita) en la estinteco ; ago kun daŭro sed pri kies finiteco oni insistas #.

Imperfekto / Imparfait (imperfekta preterito) : ago daŭra aŭ regula en la estinteco ; kondiĉo por enkonduki prezencan de la kondicionalo.

Pluskvamperfekto / Plus-que-parfait : ago antaŭa al la imperfekto (foje antaŭa al la perfekto) ; kondiĉo por enkonduki preteriton de la kondicionalo #.

Antaŭpreterito / Passé antérieur : ago antaŭa al la perfekto ; uzata en klasika literaturo, kaj nun ĝin anstataŭas la kompleksa perfekto, la perfekto, eventuale la pluskvamperfekto #*.

Kompleksa perfekto / Passé surcomposé (kun du help-verboj) : ago antaŭa al la perfekto (foje antaŭa al la imperfekto) #**.

Futuro / Futur : ago estonta ; ago posta al la prezenco de rakonto, sed kiu situas en la estinteco.

Antaŭfuturo / Futur antérieur : ago estonta sed finita antaŭ ol komenciĝos alia ; foje anstataŭas la perfektan por esprimi supozon pri io en la estinteco (« Il aura raté le bus / Li verŝajne maltrafis la buson ») #.

La subjunktivo esprimas ideon necertan, dubon, timon, bedaŭron, esperon, kaj ankaŭ nepron aŭ volon (ago submetita al sento). Ĝi ankaŭ anstataŭas la imperativon kiam tiu ne ekzistas (je la unua persono singulare kaj je la tria persono singulare kaj plurale). La diversaj tensoj estas :

Prezenco / Présent : ago nuna aŭ tuj posta al la ĉefpropozicia prezenco aŭ imperfekto (« Je veux que tu viennes. », « Je voulais que tu viennes demain. »).

Perfekto / Passé (perfekta preterito) : ago antaŭa al la ĉefpropozicia prezenco aŭ imperfekto (« Je suis content que tu aies pris une décision hier. », « J'étais content que tu aies pris une décision la veille. ») #.

Imperfekto / Imparfait (imperfekta preterito) : ago nuna aŭ tuj posta al la ĉefpropozicia imperfekto de la indikativo (« Je voulais que tu prisses une décision tout de suite. », « Je voulais que tu prisses une décision le lendemain. ») *.

Pluskvamperfekto / Plus-que-parfait : ago antaŭa al la ĉefpropozicia imperfekto de la indikativo (« J'étais content que tu eusses pris une décision la veille. ») #**.

La kondicionalo esprimas ke ago estas ebla, sub iu kondiĉo (sed tiu kondiĉo estas esprimata per preterito de indikativo). Pli ĝenerale la kondicionalo iel estas la futuro en la estinteco. La diversaj tensoj estas :

Prezenco / Présent : supozata ago nuna post kondiĉo en imperfekto de la indikativo (« Si j'étais riche, je voyagerais / Se mi estus riĉa, mi vojaĝus ») ; neefektivigita ago post preterito (« Je pensais qu'il viendrait / Mi supozis ke li venos ») ; ĝentila formo de peto (« J'aimerais que tu viennes / Mi ŝatus ke vi venu ») ; informo ne ankoraŭ konfirmata (« Il y aurait plusieurs victimes / Laŭdire estas pluraj viktimoj »)

Preterito / Passé (unua formo) : supozata ago post kondiĉo en pluskvamperfekto de la indikativo (« Si j'avais été riche, j'aurais voyagé / Se mi tiam estus riĉa, mi vojaĝus ») #.

Preterito / Passé (dua formo) : supozata ago post kondiĉo en pluskvamperfekto de la indikativo. Ĝi estas renkontebla nur en klasika literaturo #*.

La imperativo esprimas ordonon, konsilon, instigon. La diversaj tensoj estas :

Prezenco / Présent : momenta ordono.

Preterito / Passé : ordono plenumenda antaŭ specifa momento en la futuro #.

Notoj :

: kompleksa kun unu help-verbo ;

: super-kompleksa kun du help-verboj ;

* : ne troveblas en la originala versio de « La horoj subteraj ».

5 Prezento de la verbaj tempoj kaj modoj en Esperanto

Indikativo, kondicionalo kaj volitivo estas modoj. Participo kaj infinitivo estas modaloj pri kiuj oni apenaŭ parolos en ĉi tiu dokumento (nur per kelkaj rimarkoj pri la infinitivo en la ekzemploj).

La indikativo havas tri tensojn korelative al tri tempoj :

Prezenco : por tio okazanta nun.

Krome, la prezenco estas la natura tempo por ĉio ĝenerala kaj / aŭ ekstertempa, aŭ kiam io jam ripetiĝis plurfoje ĝis la nuno, kaj normale plu ripetiĝos.

Preterito : por tio okazanta en la estinteco (nun okazinta)

Futuro : por tio okazanta en la estonteco (nun okazonta)

La kondicionalo estas uzata :

por esprimi fiktivan supozon kaj ties (same supozatan) konsekvencon (« Se li sciis tion li ne venus / S'il savait cela, il ne viendrait pas ») ;

por esprimi dubon aŭ neverŝajnon, subdirite “Se tio estus ebla ...” (« Ho ! se mi havus rifuĝejon / Ah ! si j'avais un refuge »)

por ĝentile peti, kvazaŭ “Se tio ne ĝenus vin ... ” kaj “sed mi komprenos eventualan rifuzon” (« Ĉu mi povus havi panon ? / Pourrais-je avoir du pain ? »).

La kondicionalo esprimas ion ekstertempan (en la estunteco), do ĝi havas nur unu tenson.

La volitivo estas uzata por esprimi volon, deziron, peton aŭ ordonon. La volitivo estas speco de relativa tempo (implice kun futura signifo).

Kvar sufiksoj aktivaj, respektive kvar pasivaj utilas por formi participojn :

Predikto : ont, ot (ago ne komenciĝinta)

Imperfektivo : ant, at (ago komenciĝinta sed ne finiĝinta)

Perfektivo : int, it (ago finiĝinta)

Fiktivo : unt, ut (ago supozata kaj neverŝajna)

6 Komentoj

Pro la evidenta komplekseco de la franclingva gramatiko koncerne la verbojn (eĉ ne estas prezentataj ĉi tie la ortografio, la konjugacio, la tri verbo-grupoj, la aspektoj, la transitiveco, kpt, kpt kaj apenaŭ la participo kaj la infinitivo), estus iluzie starigi regularon, eĉ rekomendojn, kiuj okaze de tradukado, donus solvon al ĉiu aparta situacio.

La sola maniero elturniĝi cele al akceptebla rezulto, konsistas en du sinsekvaj etapoj :

. bona kompreno de la originala teksto laŭ la jenaj demandoj : kiam okazis ? laŭ kiu kronologio ?, kaj eventuale : laŭ kiu implico-procezo ? Kiuj el la respondoj al tiuj demandoj estas eksplikitaj en la originala teksto, kiuj estas intence nebulaj aŭ prisilentitaj ?

. reesprimo en Esperanto, nepre forgesante la tipe franclingvajn gramatikajn solvojn, sed uzante la tipe esperantlingvajn rimedojn (ekzemple : aldonon de tempo-signifa adverbo).

7 Tempo absoluta kaj tempo relativa

La absoluta tempo estas la tempo de la faktoj, la tempo de tio dirita de la rakontanto, de la raportisto aŭ de la verkisto. Estas la tempo uzata en la ĉefpropozicioj.

La relativa tempo estas la tempo de la diraĵoj, de la vidaĵoj, de la pripensaĵoj, la tempo de tio dirita de la rolantoj, de la protagonistoj mem.

Iamaniere ambaŭ tempoj estas relativaj (!).

La absoluta tempo estas relativa al la momento de la rakontado (de la ago rakonti, raporti aŭ verki).

La relativa tempo estas relativa al la momento de tio okazanta en la rakonto. Estas la tempo uzata en la subpropozicioj, eksplícite rektaj komplementoj de la agoj diri, opinii, klarigi, vidi, aŭdi, kaj cetere.

En romano aŭ en novelo, la absoluta tempo povas esti tute alispeca, kiam ĝi estas relativa al la momento de la legado. Almenaŭ tion la verkisto ŝajnigas al la leganto por ke tiu ĉi virtuale troviĝu en la momento de tio rakontata*. En tiu okazo, la absoluta tempo uzata estas la preterito, la prezenco aŭ la futuro depende ke la ago situas respektive antaŭ, dum aŭ post la momento travivata de la leganto. Sed gravas kompreni ke tiu speco de absoluta tempo senĉese ŝanĝiĝas laŭ la kronologia evoluo de la rakontata historio. Tio iel ilustras la ĉefan karakterizon de la nuna momento : ĝi senĉese ŝanĝiĝas.

Noto* : Varianto de tiu fenomeno troviĝas en fakaj dokumentoj por resendi al antaŭa ĉapitro (« Comme il a été dit au chapitre ... » (« Kiel jam dirite en la ĉapitro ... »)), aŭ por antaŭ-anonci postan ĉapitron « Comme il sera démontré au paragraphe ... » (« Kiel pruvite en la paragrafo ... »). Tio ne vere necesas en Esperanto.

Noto* : Varianto de tiu fenomeno troviĝas ankaŭ en receptoj aŭ uzkonsiloj (« On ajoutera un peu de sel. / Vi aldonu iom da salo. »).

Tamen, krom pro tiu literatur-cela procedo, ĉio rakontita, kiu troviĝas en la estinteco, estu en la preterito, kaj konsekvence la prezenco aŭ la futuro de rakonto tre ofte renkonteblaj en la franca, ne eblas por absoluta tempo en Esperanto. Cetere ne eblas miksi ambaŭ procedojn sine de sama kohera teksto-peco.

Noto : Kelkaj fakoj estas esence ekstertempaj (matematiko, filozofio), en kiuj la tempo uzata estas preskaŭ ekskluzive la prezenco, ĉu absoluta ĉu relativa (cetere la relativa estas malofta), kompreneble escepte de la kromaj fakhistoriaj komentoj (« Fermat konjektis ... », « Hegel opiniis ... »).

Sinteza klarigo :

Por la postaj klarigoj, oni antaŭ-decidu la jenajn notaciojn, laŭ kronologia ordo :

- A : antaŭa momento ol tio rakontata ;
- M : ĉefa momento de tio rakontata ;
- P : posta momento ol tio rakontata ;
- V : momento de la verkado ;
- L : momento de la legado.

Povas efektive okazi konfuzo inter kvar fenomenoj malsam-specaj :

1. Kiam por rakonti ion ĉe M respektive P (**absoluta** tempo), la franca lingvo uzas subite la prezencon, respektive la futuron (t.n. de rakonto), dum ie-tie la cetero uzas la preteriton, Esperanto nepre uzu simple la preteriton kaj por io ĉe A, kaj por io ĉe M, kaj por io ĉe P, ĉar ĉiuj estas antaŭaj al V ;

« Il marchait sur la place. C'est alors qu'il repense à ... / Li paŝis sur la placo. Ĝuste tiam li repensis pri ... »

« L'hôtel lui plaisait. Elle verrait plus tard qu'il n'était pas si confortable. / La hotelo plaĉis al ŝi. Ŝi konstatis poste ke ĝi ne estas tre komforta. »

2. Kiam en literatura teksto, la verkisto identigas la momenton L (nu ankaŭ V) kaj la momenton M, tiam ambaŭ lingvoj uzas (**absoluta** tempo) la preteriton por A, la prezencon por M kaj la futuron por P ;

3. Ĉe subpropozicio kun nereкта formo (*vidu la postan ĉapitron*) (**relativa** tempo / relativa al M), la franca uzas :

. la antaŭpreteriton (la pluskvamperfekton de la indikativo aŭ de la subjunktivo, eventuale la perfekton de la subjunktivo) por io okazanta antaŭ la absoluta tempo (M),

. la preteriton por io okazanta dum la absoluta tempo (M),

. jen la prezencon aŭ la preteriton de la kondicionalo, jen la prezencon aŭ la imperfekton de la subjunktivo, por io okazanta post la absoluta tempo (M).

Dume Esperanto logike uzas la “normalan” relativan tempon, respektive :

. la preteriton,

. la prezencon,

. la futuron, eventuale la volitivon.

Ekzemple :

« Elle comprenait que le voisin avait eu raison la veille. / Ŝi ekkomprenis ke la najbaro pravis la antaŭan tagon. »

« Il constatait que l'homme travaillait. / Li konstatis ke la viro laboras. »

« Ils prévoyaient que le chef viendrait. / Ili konjektis ke la ĉefo venos. »

« Ils voulaient qu'il ouvre la porte. / Ili volis ke li malfermu la pordon. »

4. Ĉe subpropozicio (rilata aŭ adjekta) sen nereкта formo (**relativa** tempo / relativa al M), la franca uzas :
- . la antaŭpreteriton (la pluskvamperfekton de la indikativo aŭ de la subjunktivo, eventuale la perfekton de la subjunktivo) por io okazanta antaŭ la absoluta tempo (M),
 - . la preteriton por io okazanta dum la absoluta tempo (M),
 - . jen la prezencon aŭ la preteriton de la kondicionalo, jen la prezencon aŭ la imperfekton de la subjunktivo, por io okazanta post la absoluta tempo (M).

Dume Esperanto uzas la absolutan tempon, respektive :

- . la preteriton,
- . la preteriton,
- . la preteriton.

Ekzemple :

« Elle comprit alors le voisin qui lui avait parlé la veille. / Ŝi tiam komprenis la najbaron kiu alparolis ŝin la antaŭan tagon. »

« Il voyait l'homme qui travaillait. / Li vidis la viron kiu laboris. »

« Ils voyaient l'homme qui mourrait après eux. * / Ili vidis la viron kiu mortis post ili. »

Noto * : en la franca, eblas uzo de la absoluta tempo : « Ils voyaient l'homme qui mourut après eux. »

8 **Formoj rekta, kvazaŭ-rekta, duon-rekta kaj nereкта**

La relativa tempo troviĝas en la jenaj formoj :

- . rekta formo (laŭvorta diraĵo aŭ mesaĵo de protagonisto kun interpunkciaĵoj, ekzemple en dialogo) ;
- . kvazaŭ-rekta formo (laŭvorta diraĵo aŭ mesaĵo de protagonisto sen specifaj interpunkciaĵoj, foje ene de tio rakontita) ;
- . duon-rekta formo (diraĵo aŭ mesaĵo de iu protagonisto, sed kvazaŭ la verkisto mem dirus anstataŭe) ;
- . nereкта formo (diraĵo aŭ mesaĵo de iu protagonisto, sed post ol la verkisto eksplicite mencias kiu protagonisto diras).

La formoj rektaj kaj nerektaj estas la kutimaj formoj tradicie uzataj en la literaturo, ankaŭ en la ĉiutaga lingvo, ĉu skribita, ĉu parolata.

La duon-rekta formo ne estas nova. Ĝi foje renkontiĝas en la literaturo. Ĝi estas nereкта formo kies ĉefpropozicion estus surperflue aldoni, plej ofte ĉar la kunteksto klare informas pri kiu parolas aŭ pripensas.

La kvazaŭ-rekta formo ŝajne estas novaĵo. Ĝi renkontiĝas multe pli ofte de du-tri jardekoj. Ĝi simple estas rekta formo kies interpunkciaĵo estis forigita.

La problemo de la rekta, respektive de la nereкта formo, havas du konsekvencojn, nome :

. la pronomoj uzataj, ĉu subjekto ĉu komplemento, klare indikas ĉu temas pri rekta aŭ kvazaŭ-rekta formo, ĉu pri duon-rekta aŭ nereкта formo. Ĉi-rilate ambaŭ lingvoj funkcias same, kaj sendepende de la absoluta tempo de eventuala ĉefpropozicio.

. la tempo de la verbo (relativa tempo). Ĉi-rilate ambaŭ lingvoj same funkcias kiam la absoluta tempo estas la prezenco aŭ la futuro (tiam la relativa tempo identas por ĉiu formo, ĉu rekta, ĉu nereкта). Kiam la absoluta tempo estas la preterito (do en la estinteco), la franca lingvo (male al Esperanto) uzas la absolutan tempon* ĉe la nereкта formo, ne nur en la ĉefpropozicio, sed ankaŭ en la subpropozicio.

Noto * : Eblas diri (vidu la antaŭan ĉapitron / punkton 3) ke la franca uzas relativan tempon (fakte la tempo ja estas relativa), sed kun tiel stranga elekto de la tensoj, ke ili estas identaj al tiuj de la absoluta tempo.

Jen ĉi-poste tri ekzemploj (ĉiuj kun la ĉef-propozicioj en la estinteco por evidentigi la diferencon inter la du lingvoj). La tri ekzemploj estas prezentitaj ambaŭlingve en la kvar formoj. La koncernataj pronomoj kaj verboj estas substrekitaj. La tria ekzemplo koncernas la kondicionalon (kun senco de kondicionalo, ne de relativa futuro), do koncernas relativan tempon sen diferenco inter la du lingvoj.

Noto : Por la tri ekzemploj, la ĝusta frazo de la romano estas la kvazaŭ-rekta formo.

Unua ekzemplo :

rekta formo

[...] il s'est inquiété de savoir si elle allait mieux, si elle s'était reposée, puis il ajouta : « Parce que vous avez l'air vraiment fatiguée, Mathilde, ces derniers temps ».

[...] li demandis ŝin ĉu ŝi fartas pli bone, ĉu ŝi ripozis, kaj li aldonis : « Ĉar vi mienas vere laca, Mathilde, de kelka tempo ».

kvazaŭ-rekta formo

[...] il s'est inquiété de savoir si elle allait mieux, si elle s'était reposée, parce que vous avez l'air vraiment fatiguée, Mathilde, ces derniers temps.

[...] li demandis ŝin ĉu ŝi fartas pli bone, ĉu ŝi ripozis, ĉar vi mienas vere laca, Mathilde, de kelka tempo.

duon-rekta formo

[...] il s'est inquiété de savoir si elle allait mieux, si elle s'était reposée, parce qu'elle avait l'air vraiment fatiguée, Mathilde, ces derniers temps.

[...] li demandis ŝin ĉu ŝi fartas pli bone, ĉu ŝi ripozis, ĉar ŝi mienas vere laca, Mathilde, de kelka tempo.

nerekta formo

[...] il s'est inquiété de savoir si elle allait mieux, si elle s'était reposée, et il ajouta qu'elle avait l'air vraiment fatiguée, Mathilde, ces derniers temps.

[...] li demandis ŝin ĉu ŝi fartas pli bone, ĉu ŝi ripozis, kaj li aldonis ke ŝi mienas vere laca, Mathilde, de kelka tempo.

Dua ekzemplo :

rekta formo

Les yeux de Corinne Santos disaient : « J'ai pitié de vous, je n'y suis pour rien, [...] ».

La okuloj de Corinne Santos diris : « Mi kompatas vin, ne mi kulpas, [...] ».

kvazaŭ-rekta formo

Les yeux de Corinne Santos disaient j'ai pitié de vous, je n'y suis pour rien, [...].

La okuloj de Corinne Santos diris mi kompatas vin, ne mi kulpas, [...].

duon-rekta formo

Les yeux de Corinne Santos parlaient, elle avait pitié d'elle, elle n'y était pour rien, [...].

La okuloj de Corinne Santos parolis, ŝi kompatas ŝin, ne ŝi kulpas, [...].

nerekta formo

Les yeux de Corinne Santos disaient qu'elle avait pitié d'elle, qu'elle n'y était pour rien, [...].

La okuloj de Corinne Santos diris ke ŝi kompatas ŝin, ke ne ŝi kulpas, [...].

Tria ekzemplo :

rekta formo

Il insista encore : « Votre silhouette, vos cheveux, j'aimerais tellement vous inviter à boire un verre. »
Li insistis denove : « Nu via figuro, viaj haroj, mi tiom ŝatus inviti vin por kuntrinko. »

kvazaŭ-rekta formo

Il a insisté encore, votre silhouette, vos cheveux, j'aimerais tellement vous inviter à boire un verre.
Li insistis denove, nu via figuro, viaj haroj, mi tiom ŝatus inviti vin por kuntrinko.

duon-rekta formo

Il a insisté encore, sa silhouette, ses cheveux, il aurait tellement aimé l'inviter à boire un verre.
Li insistis denove, nu ŝia figuro, ŝiaj haroj, li tiom ŝatus inviti ŝin por kuntrinko.

nerekta formo

Il a insisté encore, en disant que, pour sa silhouette, pour ses cheveux, il aurait tellement aimé l'inviter à boire un verre.
Li insistis denove, dirante ke, ĉe ŝia figuro, ĉe ŝiaj haroj, li tiom ŝatus inviti ŝin por kuntrinko.

Ekzemploj kun relativa futuro en la estinteco (la frazoj de la romano estas en nerekta formo) :

rekta formo

Elle avait pensé : « Jacques reviendra à la raison. Il renoncera à sa colère, laissera les choses reprendre leur cours. »
Ŝi pensis : « Jacques revenos al racia konduto. Li reziĝnos sian koleron, kaj lasos ĉion revojiĝi. »

nerekta formo

Elle avait pensé que Jacques reviendrait à la raison. Qu'il renoncerait à sa colère, laisserait les choses reprendre leur cours.
Ŝi pensis ke Jacques revenos al racia konduto. Ke li reziĝnos sian koleron, kaj lasos ĉion revojiĝi.

rekta formo

Un agent lui a promis : « Je vous conduirai jusqu'au taxi lorsque vous aurez récupéré. »
Agento promesis : « Mi akompanos vin ĝis taksio kiam vi pli bone fartos. »

nerekta formo

Un agent lui a promis qu'il la conduirait jusqu'au taxi lorsqu'elle aurait récupéré.
Agento promesis ke li akompanos ŝin ĝis taksio kiam ŝi pli bone fartos.

Ekzemplo kun la volitivo (la frazo de la romano estas en nerekta formo) :

rekta formo

Il exige : « Quitte l'appartement, pars loin, [...] ! ». Il attend : « Va-t'en ! ». Li postulas : « Vi forlasu la loĝejon, vi iru malproksimen, [...] ». Li atendas : « Vi foriru » .

nerekta formo

Il veut qu'elle quitte l'appartement, qu'elle parte loin, [...]. Il attend qu'elle s'en aille.
Li volas ke ŝi forlasu la loĝejon, ke ŝi iru malproksimen, [...]. Li atendas ke ŝi foriru.

Plej ofte, ne estas malfacile decidi pri la tempo uzenda. Tamen, en kelkaj okazoj la problemo fariĝas subite iom pli komplika.

Pro nekutima frazo-morfologio :

. kiam la diversaj pecoj de la problemo ne troviĝas en la sama frazo, pro pli libera koncepto de la sintakso ;

. kiam kunestas en la sama frazo diversaj formoj de malsamaj specoj : kvazaŭ-rekta, duon-rekta kaj nerekta, ĉio ĉi aldone al la ĉefpropozicioj.

Pro konflikto inter sintaksaj kaj signifaj konsideroj :

. kiam sekvas la rektan komplementon subpropozicio ligita al ĝi per iu korelativo “kiu”, “kia” “kies” kpt, aŭ per la ligo-vorto “kvazaŭ”. Tiam eblas sin demandi ĉu la propozicio estas, same kiel la rekta komplemento, parto de la diraĵo aŭ de la vidaĵo. « *Ŝi vidis la viron kiu kuris* » (kompreneble kun la hipotezo ke la du agoj vido kaj kuro okazas samtempe) **sintakse ja estas la rekomendata formo** (absoluta tempo), tiel la kurado de la viro ne estas inkluzivita en tio vidata de ŝi (« *“Ŝi vidis : la viron”, kiu cetere kuris* », kvazaŭ « *Ŝi vidis la viron kurantan* »). La frazo « *Ŝi vidis la viron kiu kuras* » (kompreneble kun la sama hipotezo ke la du agoj vido kaj kuro okazas samtempe, do nun en relativa tempo) povus signifi ke la kurado de la viro ja estas inkluzivita en tio vidata de ŝi (« *Ŝi vidis : “la viron kiu kuras”* », kvazaŭ « *Ŝi vidis la viron kuranta* »). En la franca la problemo estas iom identa kvankam kun diferencoj, almenaŭ pro la fakto ke oni ne uzas la relativan tempon estintece. La frazo « *Elle a vu l’homme qui courait* » ĉi-rilate estas ambigua*, kaj oni volonte dirus en unu el ambaŭ signifoj : « *Elle a vu l’homme courir* ».

Noto* : en Esperanto la ambigueco povas retroviĝi en « *Ŝi imagis la viron kiu parolis* » kiu do signifas « *Elle s’imaginait l’homme qui parlait* », sed en aparta kunteksto povus facile esti komprenata kiel « *Elle s’imaginait l’homme qui avait parlé* ».

Estas konsilinde :

« Elle voyait l’homme qui courait / *Ŝi vidis la viron kiu kuris* » (absoluta tempo en Esperanto)

. kiam sekvas la subpropozicion (kun relativa tempo) mem, alia subpropozicio samnivele ligita al la antaŭa per iu korelativo “kiu”, “kia”, “kies”, “kio” kpt, aŭ per unu el la ligo-vortoj “kvazaŭ”, “ĉar”, kaj cetere. Ĉu la dua propozicio estas, same kiel la unua, parto de la diraĵo aŭ de la vidaĵo, ne estas io evidenta. « *Li vidis ke ŝi faras kion ŝi volas/volis / Il voyait qu’elle faisait ce qu’elle voulait* » (kompreneble kun la hipotezo ke la tri agoj vido, faro kaj volo okazas samtempe). Nu, vere malfacilas spontanee decidi.

Estas konsilinde :

« Il voyait qu’elle faisait ce qu’elle voulait / Li vidis ke ŝi faras kion ŝi volas » (relativa tempo en Esperanto)

9 Esprimo de antaŭeco

Striktasence ne ekzistas en Esperanto kompleksaj tensoj por esprimi antaŭecon. Ne pli ekzistas (almenaŭ sub tiu formo) help-verboj “aller”, “venir de”, “être sur le point de”, “se mettre à”, ... kiel tiuj renkonteblas en la franca.

Antaŭecon (respektive postecon) oni esprimas per aliaj diversaj rimedoj :

. aldono de adverbo (antaŭe, poste, ĵus, tuj, jam, baldaŭ, preskaŭ, apenaŭ, la hieraŭon, la morgaŭon, pli frue, anticipe, iam ...), eventuale de prefikso (antaŭ, ek, ...);

- . komparo en la tempo (antaŭ ol, post ol, ...);
- . situigo en specifa antaŭa aŭ posta momento (tiam, tiun jaron, ...) jam menciita pli frue en la rakonto;
- . precizigo de horo aŭ de dato sen ambiguo en la rakontaĵo;
- . esprimo de implica ideo kun kaŭzo kaj konsekvenco, ĉar la kaŭzo nature okazas antaŭ la konsekvenco (vidu la tiuteman apendicon fine de la dokumento);
- . uzo de relativa tempo okaze de nereкта aŭ duon-rekta formo (« Li diris ke li alvenis / Il disait qu'il était arrivé »);
- . elekto de aktivaj aŭ pasivaj sufiksoj kiuj klare montras ke, relative al la alia, la ago jam finiĝis, (respektive ne komenciĝis). Interalie, tiu metodo estas tre utila por traduki la preteriton de la imperativo (« Ayez fini votre travail quand j'arriverai / Estu finintaj vian taskon kiam mi alvenos »). Male, ĝi estas strikte malaprobinda por la preterito de la kondicionalo, kaj estu uzata kun granda prudento por la pluskvamperfekto de la indikativo;
- . elekto de verbo (i.a. kunmetaĵo) kies senco klare indikas la kronologion (ekzemple el PAG §271(1/b): « Mi ne ricevis la libron, kiun mi mendis / La viktimojn, kiuj mortis ĉe la akcidento, oni enterigis kun granda funebra soleno »). Ankaŭ citindas la radikoj “konfirm”, “efektiv”, kpt. Ĉirilate povas utile interveni la fakto ke la ago havas daŭron aŭ ne, eventuale ke ĝi havas rezulton aŭ ne (vidu la postan ĉapitron);
- . foje la kunteksto sufiĉas por ke la antaŭeco aŭ la posteco estu evidenta. Cetere ĉiam necesas demandi sin ĉu la esprimo de antaŭeco en la originala versio vere necesas, ĉu ne estas simple sintaksa kutimo de tiu lingvo (cetere multe pli ofte prezentiĝas la problemo de la antaŭeco ol tiu de la posteco!).

10 Daŭro kaj rezulto

Ekzistas pluraj specoj de verboj, ofte facile distingeblaj:

1. Verboj kun daŭro kaj rezulto: “desegni / dessiner”, “konstrui / construire”, “legi / lire”, “lerni / apprendre”, “skribi / écrire”, ...
2. Verboj kun daŭro sen rezulto: “ami / aimer”, “enteni / contenir”, “koni / connaître”, “konscii / avoir conscience de”, “timi / craindre”, “voli / vouloir”, ...
3. Verboj kun rezulto sen daŭro: “doni / donner”, “kapti / saisir”, “rifuzi / refuser”, “rimarki / remarquer”, “trovi / trouver”, ...

La verboj el tiuj tri kategorioj funkcias relative malsimile. Por ilustriti tion, sufiĉas observi la jenan frazon: « Petro memoras (*kategorio 2*) la melodion, sed Paŭlo ĝin forgesis (*kategorio 3*) / Pierre se souvient de la mélodie, mais Paul l'a oubliée ». En tiu ĉi ekzemplo, la forgeso okazis efektive antaŭ la nuna momento, sed nur ĉar la ago forgesi estas laŭdifine sendaŭra kaj ĉar gravas la rezulto. En tiu okazo, la franca uzas la perfektan preteriton. En la estinteco, la frazo fariĝus: « Pierre se souvenait de la mélodie, mais Paul l'avait oubliée », kun la pluskvamperfekto.

Tiu rimarko (pri la tri kategorioj) havas konsekvencojn en la uzo de la participoj (vidu la postan ĉapitron).

Notoj:

La aldono de la prefikso “ek” ŝanĝas la kategorion (2→3). « Oni scias ion, ĉar tion oni eksciis ».

Ankaŭ la aldono de la sufikso “ad” ŝanĝas la kategorion (3→1).

Tiuj du afiksoj (“ek” kaj “ad”) iel rilatas al pritempa koncepto. Sed pli ĝenerale kunmetado povas ŝanĝi la kategorion. Tipa ekzemplo: “kapti” estas en la kategorio 3, sed “fiŝkapti” estas en la kategorio 2.

11 Kompleksaj formoj

Kompleksan verban formon oni konstruas per help-verbo (“avoir” aŭ “être” en la franca, “esti” en Esperanto), kaj per participo (tiel nomataj “passé” aŭ “présent” en la franca, “aktiva” aŭ “pasiva” en Esperanto). Estas evidente ke la du sistemoj enhavas similaĵojn, sed aliflanke multe da principaj kaj eĉ fundamentaj malsimilaĵoj.

En la franca, la kompleksaj formoj (sendepende de la modo) utilas por esprimi antaŭecon de iu ago rilate al la absoluta tempo, tiel ke la **komenco** de la ago (kaj parto de tiu ĉi ago) efektive okazas antaŭ la momento de la absoluta tempo. Tio tute ne implicas ke tiam la ago estas finita, nek ke ĝia eventuala rezulto estas efektiva aŭ disponebla, eĉ se ofte tion oni scias de la kunteksto.

En Esperanto, la kompleksaj formoj uzas la aktivajn sufiksojn. Por esprimi antaŭecon en la estinteco, la formo “estis ~inta” indikas ne nur ke la ago komenciĝis antaŭe, sed ke tiam la ago jam finiĝis. La kompleksa formo indikas do la **finon**^{*} de la ago. Tio signifas ke, se la ago ne estas finita en la momento de la absoluta tempo, simple “int” ne povas esti uzata por esprimi antaŭecon.

Noto^{*} : tion ilustras la frazo de Zamenhof, eĉ se per pasivaj sufiksoj : « La mono estis longe kolektata, sed fine ĝi tamen estis kolektita. »

Noto : paradokse, la sufukso “ont”, kiu indikas ke la ago ne ankoraŭ komenciĝis, estus perfekta rimedo por esprimi postecon. Ĉi-okaze, la franca uzas adverbos aŭ help-verbos : “être sur le point de ...”, “aller ...”, “se mettre à ...”, ...

Pro la fakto ke la kompleksaj formoj estas (denove) grandparte malsimilaj, ankaŭ pro la fakto ke Esperanto disponas aliajn pli simplajn kaj pli elegantajn rimedojn, estas konsilinde eviti kiel eble plej ofte la uzon de kompleksaj formoj por esprimi ideon de antaŭeco.

Kelkaj atentigoj okaze de tradukado (esprimo de antaŭeco) :

. pluskvamperfekto (indikativo aŭ subjunktivo) : uzo de kompleksa formo “estis ~inta” estas uzebla sed kun granda prudento, kaj post konsidero de aliaj solvoj. Laŭ la kategorioj :

ĉe verbo sen daŭro kun rezulto, kompleksa formo apriorie uzeblas senprobleme : « Petro memoris la melodion, sed Paŭlo estis ĝin forgesinta / Pierre se souvenait de la mélodie, mais Paul l’avait oubliée » ; « Les pompiers avaient renvoyé l’appel à la base / La fajro-brigadistoj estis resendintaj la alvokon al la centralo » ;

ĉe verbo kun daŭro kun rezulto, kompleksa formo uzeblas sed tre prudente (ke la ago ja estu finita kaj la rezulto disponebla) ;

ĉe verbo kun daŭro sen rezulto, kompleksa formo uzeblas kondiĉe ke la kunteksto mem evidentigu la finitecon de la ago. Ekzemple : « Elle l’avait aimé (finiteco implicita) / Ŝi estis aminta lin (finiteco eksplacita) »

. preterito de la kondicionalo : en tiu modo, la uzo de kompleksa formo “estus ~inta” estas nenatura kaj malkonsilinda (vidu la postan ĉapitron).

. preterito de la imperativo : en tiu modo, la uzo de kompleksa formo “estu ~inta” estas efika kaj eĉ konsilinda. Eble la semantika valoro de la volitivo helpas (volo de efektiva plenumo) : « Ayez fini votre travail quand j’arriverai / Estu fininta vian taskon kiam mi alvenos ».

12 Kutimaj eraroj far la franclingvanoj

Ne estas strange ke la listo de kutimaj eraroj fare de la franclingvanoj pli-malpli kongruas kun la listo de diferencoj inter la du lingvoj. Koncerne la funkciadon de la verbo-tempoj, regule konstateblas :

. la uzo de la prezenco (kiam en la cetero de la teksto la preterito estas uzata) aŭ de la futuro por rakonti ion okazintan. Tiu problemo tre ofte renkontiĝas en gazetoj kiam ekzemple esperantistoj rakontas sian lastan partoprenon al iu movada aranĝo, en libroj pri Historio aŭ en biografioj.

krom la fakto ke (por absoluta tempo) uzi la preteriton por io okazinta estas natura, tio enhavas alian avantaĝon : ĉio ekstertempa kaj ĝenerala, ekzemple rilate al la lando vizitata plu evidentiĝas en la prezenco, tiel ke estas facile distingi inter kio apartenas al la efemera esperantista aranĝo delonge finita, kaj kio apartenas al priskribo de io plu ekzistanta. Tio faciligas ankaŭ la esprimon de nerektaj formoj kun relativa tempo. Fine, oni tiel evitas la strangajn formojn relative oftajn en la franca, en kiuj momento estas eksplicita (dato, horo) sen atento pri ties kongruo kun la verbo-tempo, tipe : « *Hier, il regarde par la fenêtre, et qu'est ce qu'il voit ... ?* », « *Maintenant, il se sentait las.* ».

kiam tiu t.n. rakonto-tempo esprimas kronologion en la estinteco, estas necese uzi tute alian rimedon (vidu antaŭan paragrafon pri esprimo de antaŭeco).

kompreneble en literaturaĵo (nu raporto pri la lasta kunveno de la klubo ne estas literaturaĵo), estas akceptebla uzi la prezencan por situigi la leganton en la rakontita momento. Sed nur se unuforme kaj kohere, tiel ke la absoluta tempo rilatas al la momento travivata.

tiuj rimarkoj (pri uzo de prezenco aŭ futuro de rakonto) nepre ne koncernas iun eventualan relativan tempon en la teksto. Ĉi-okaze uzo de prezenco aŭ de futuro estas io tute normala.

. ne kompreno ke la kondicionalo estas ekstertempa ;

la kondicionalo utilas por esprimi ideon de kondiĉo (kun ĝia konsekvenco), akcesore de malverŝajno, aŭ por ĝentilaĵo. Normale (plej ofte) la rilato inter kondiĉo kaj ĝia konsekvenco valoras sendepende de la momento. Eĉ ĝi principe estas ligita al neniu specifa momento (ĝi situas en la estunteco). La kutimoj de la franca pri tio, plej ofte estas nenio krom ignorinda en Esperanto.

kiam esprimo de la antaŭeco ol alia fakta okazaĵo en la estinteco estas bezonata, estas necese uzi tute alian rimedon (vidu antaŭan paragrafon pri esprimo de antaŭeco).

tiu rimarko havas evidentan rilaton kun la sekvanta punkto.

. troa uzo de kompleksaj verbo-formoj por esprimi antaŭecon ;

tio ne estas ĉiufoje eraro, kvankam la rezulto aspektas stile peza kaj ofte tute neutila. Sed tiuj formoj ne estu komprenataj kiel indikoj de antaŭeco de la absoluta tempo, ni diru de antaŭ-tempo, sed kiel indiko de finiteco de la ago. Ni atente rigardu la jenajn signifoplenajn ekzemplojn :

« li estis devinta fari tion » signifas « li ne plu devis fari tion »

do ne povas esti la traduko de « il avait dû faire cela »

« se mi estus sciinta, mi ne estus veninta » signifas « se mi ne plu sciis, mi ne venus »

do ne povas esti la traduko de « si j'avais su, je ne serais pas venu »

« kion li estus farinta, se li estus vivinta pli longe ! »

signifas « kion li ne plu farus, se li pli longe ĉesus vivi !!!!! »

dum la celita signifo simple estas « kion li farus (*evidente siaepoke !*), se li vivus pli longe ! »

. fuŝaj uzoj de la tempo ĉe nerektaj aŭ duon-rektaj formoj ;

tio ne necesigas denovajn komentojn.

. troa sinksekvo de infinitivoj.

tio estas kutimo en la franca sed ne en Esperanto.

13 Ekzemploj el la romano

Pli-malpli ĉiuj interesaj problemoj ĉi-antaŭe menciitaj retroviĝas en la postaj eltiraĵoj el “Les heures souterraines” / “La horoj subteraj”. La selektitaj pecoj estas alineoj tial ke, en la tuta verko, la absoluta tempo estas unuforma sine de alineo. Tamen kiam la alineo estas neutile longa por montri specifan verbotempan problemon, la signo [...] montras kie parto estis forigita. La pecoj estas prezentitaj laŭ la ordo de la romano, en unuforma maniero : unue la franclingva versio, due la esperantlingva versio, fine kelkaj komentoj. La interesaj verboj pritraktataj en la komentoj estas substrekitaj.

Simpla legado kaj komparo estas utila, sed provo de tradukado estas eĉ pli utila. Oni simple memoru ke neniuj traduko estas ununura, unuanime aprobebla, nek cent-pro-cente fidela. Diferencoj ja aperos inter nova traduk-provo via kaj tiu proponata. Momente la celo estas koncentriĝi pri la problemoj de la verbo-tempoj.

Ils s'étaient assis autour de la table, Mathilde avait échangé quelques mots avec le Directeur de l'Institut, Jacques était en retard, Jacques était toujours en retard. Il avait fini par entrer dans la salle, sans s'excuser, les traits tirés et le rasage approximatif. Mathilde portait un tailleur sombre et ce chemisier de soie claire qu'elle aime bien, elle s'en souvient avec une précision étrange, elle se souvient aussi de la manière dont l'homme était habillé, la couleur de sa chemise, la bague qu'il portait à l'auriculaire, le stylo qui dépassait de la poche de sa veste, comme si les détails les plus insignifiants avaient été inscrits dans sa mémoire, à son insu, avant qu'elle prenne conscience de ce moment, de ce qui allait s'y produire, que rien ne pourrait réparer. [...]

Ili sidis ĉirkaŭ la tablo, Mathilde interŝanĝis kelkajn vortojn kun la Direktoro de la Instituto, Jacques estis malfrua, Jacques malfruis en ĉiuj okazoj. Li fine eniris la ĉambron, sen ekskuzi sin, kun lacaj trajtoj kaj senzorge prirazita. Mathilde estis vestita per malhela ensemblo kaj per tiu bluzo el hela silko kiun ŝi ja ŝatas, tion ŝi memoras laŭ stranga precizeco, ŝi memoras ankaŭ la manieron laŭ kiu la viro estis vestita, la koloron de lia ĉemizo, la ringon kiun li portis ĉe la etfingro, la globkrajonon videblan el la poŝo de lia jakto, kvazaŭ la plej sensignifaj detaloj estus skribitaj en ŝia memoro, sen ŝia scio, antaŭ ol ŝi ekkonsciis pri la graveco de tiu momento, pri tio okazonta tie ĉi, kiun nenio povos ripari. [...]

Komentoj :

La pluskvamperfekton oni simple traduku per is-formo. La kronologia rakonto sufiĉas. Eventuala aldono de adverbo (“fine”) utilas.

“avaient été” havas evidentan signifon de kondicionalo. Male, la pasinta formo de la franca frazo superfluas.

La kondicionalo en la franca havas valoron de futuro, sed relative al la ekkonscio de Mathilde. Cetere ĉu la riparon inkluzivas ŝia ekkonscio, tion oni ne eksplicite diras en la franca. Alidirite, ne estas evidente ke temas pri speco de subpropozicio aŭ ne. Ŝajne du solvoj eblas : aŭ “povos ripari” aŭ “povis ripari poste”.

Mathilde regardait les mains de cet homme, elle s'en souvient, les gestes longs qui accompagnaient son propos. Elle s'était demandé d'où lui venait cet accent léger, à peine perceptible, cette note singulière qu'elle ne parvenait pas à identifier. Elle avait senti très vite que l'homme agaçait Jacques, sans doute parce qu'il était plus jeune, plus grand et au moins aussi bon orateur que lui. Elle avait senti très vite que Jacques se raidissait.

Mathilde rigardis la manojn de tiu viro, ŝi tion memoras, la lantajn gestojn dum lia parolado. Ŝi demandis sin de kie venas tiu eta akĉento, apenaŭ perceptebla, tiu nekonata tono kiun ŝi ne sukcesis identigi. Ŝi tre rapide sentis ke Jacques estas incitata de la viro, verŝajne ĉar tiu estis pli juna, pli granda ol li kaj almenaŭ same bona preleganto kiel li. Ŝi tre rapide sentis ke Jacques streĉiĝas.

Komento :

Trifoje temas pri simpla nereкта formo (relativa tempo) kun as-formo en Esperanto.

[...] Plus tard, alors que le Directeur présentait les résultats de l'étude quantitative, Jacques s'était étonné que leur significativité ne figurât pas sur les graphiques projetés. Avec une politesse un peu affectée, le Directeur avait répondu que seuls les résultats dont la significativité était supérieure à 95% étaient présentés. A la fin de l'exposé, en tant que commanditaire de l'étude, Mathilde avait pris la parole pour remercier du travail fourni. Jacques se devait de dire un mot. Elle s'était tournée vers lui, avait croisé son regard et compris aussitôt que Jacques ne remercierait pas. En d'autres temps, il lui avait appris combien il importait d'établir des relations de confiance et de respect mutuel avec les prestataires extérieurs.

[...] Poste, dum la Direktoro prezentis la rezultojn de la kvanta studo, Jacques esprimis miron ke ilia signifeco ne aperas sur la projekciataj grafikoj. Per afektata ĝentileco, la Direktoro respondis ke montrindas nur la rezultoj kies signifeco superas al 95%. Fine de la prezentado, kiel mendinto, Mathilde parolis por danki pro la liverita laboro. Jacques estis devigata diri ion. Ŝi turniĝis al li, renkontis lian rigardon kaj tuj komprenis ke Jacques ne dankos. En aliaj okazoj, li plurfoje klarigis al ŝi kiom grave estas starigi interrilatojn de fido kaj de reciproka respekto kun eksteraj intervenantoj.

Komentoj :

Trifoje temas pri nereкта formo (preterito ĉu indikative ĉu subjunktive en la franca) kun as-formo pro relativa tempo ("aperas", "montrindas", "superas").

La formo "klarigis al ŝi kiom grave estas starigi interrilatojn" estas nereкта formo kun "kiom". Cetere temas pri ĝenerala konsilo kiu ne situas en preciza momento.

La kondicionalo "remercierait" en la franca havas sencon de futuro. Eĉ nuanco de dubo malaperis en ĉi tiu situacio, do aldono de adverbo ne necesas.

La plurfoja uzo de la pluskvamperfekto indikas simplan antaŭecon ol tio okazanta fine de la kunveno. Ĉar la rakonto estas kronologia, uzo de simpla is-formo sufiĉas.

Mathilde avait pour habitude d'être d'accord avec lui. D'abord parce qu'ils partageaient un certain nombre de convictions, ensuite parce qu'il lui était apparu, dès les premiers mois de leur collaboration, qu'être d'accord avec Jacques était une position à la fois plus confortable et plus efficace. Il ne servait à rien de le prendre de front. De fait, Mathilde parvenait toujours à exprimer ses raisons et ses propres choix, parfois à le faire changer d'avis. Mais cette fois, l'attitude de Jacques lui avait paru d'une telle injustice qu'elle n'avait pu s'empêcher de reprendre la parole. Sur le ton de l'hypothèse, sans le contredire directement, elle avait expliqué en quoi il lui semblait que les orientations proposées, au regard des évolutions du marché et des autres enquêtes effectuées au sein du groupe, méritaient d'être étudiées.

Mathilde kutime konsentis kun li. Unue ĉar ili partigis plurajn komunajn konvinkojn, krome ĉar evidentiĝis al ŝi, ekde la unuaj monatoj de kuna laborado, ke akordi kun Jacques estas sinteno kaj pli komforta kaj pli efika. Ne utilis lin alfronti. Fakte, Mathilde ĉiam sukcesis esprimi siajn motivojn kaj siajn proprajn inklinojn, foje modifi lian opinion. Sed ĉifoje la konduto de Jacques aspektis al ŝi tiom maljusta, ke ŝi ne povis sin malhelpi repreni la parolon. Laŭ hipoteza tono, sen kontraŭdiri lin rekte, ŝi klarigis kial, ĉe la evoluoj de la merkato kaj ĉe la aliaj studoj efektivigitaj sine de la firmao, la proponitaĵoj meritis esti ekzaminataj.

Komentoj :

“ke akordi kun Jacques estas sinteno ...” *estas subjekto de “evidentiĝis”. Apliki la regulon kvazaŭ je subpropozicio, estas do perturbe. Tamen analoge al la formo “ŝajni ke”, la relativa tempo estas pravigebla (PAG §270 (1)). Aliflanke, la as-formo oportunas ĉar temas pri fakto relative sendependa de la momento.*

“... tiom maljusta, ke ŝi ne povis ...”. *Simple ne temas pri subpropozicio laŭ la signifo. La pluskvamperfekto ne indikas antaŭecon, krom al tio okazanta fine de la kunveno. La is-formo sen aldono plej taŭgas (absoluta tempo).*

Estas malfacile decidi ĉu “meritis” ĉu “meritas”, do ĉu ĝi estas subpropozicio de “klarigis”. Verŝajne decidindas ke ne, konsiderante ke la signifo estas “... klarigis tion pro kio ... la proponitaĵoj meritis esti ekzaminataj.”

Il n'avait pas renchéri.

Elle en avait conclu qu'il s'était rendu à ses arguments. Elle avait raccompagné le Directeur de l'Institut jusqu'à l'ascenseur.

Li nenion aldonis.

Ŝi supozis ke li akceptis ŝiajn argumentojn. Ŝi reakompanis la Direktoron de la Instituto ĝis la lifto.

Komento :

Nerekta formo (relativa tempo), sed evidente la akcepto de la argumentoj okazis antaŭ ŝia supozo.

Il lui avait fallu plusieurs semaines pour revenir à cette scène, se la remémorer dans son intégralité, se rendre compte à quel point chaque détail restait présent à sa mémoire, les mains de l'homme, cette mèche de cheveux qui barrait son front lorsqu'il se penchait, le visage de Jacques, ce qui avait été dit, ce qui était resté dans le silence, les dernières minutes de la réunion, la manière dont l'homme lui avait souri, son expression de reconnaissance, la manière dont il avait ramassé ses affaires, sans empressement. [...]

Pasis pluraj semajnoj ĝis ŝi revenis al tiu okazaĵo, por ĝin entute rememori, ekkonscii kiagrade ĉiu detalo restas neta en ŝia memoro, la manoj de la viro, har-fasketo tra lia frunto kiam li kliniĝis, la vizaĝo de Jacques, kio estis dirita, kio prisilentita, la lastaj minutoj de la kunveno, kiel la viro ridetis al ŝi, lia dankema rigardo, kiamaniere li ordigis siajn aferojn, senurĝe. [...]

Komento :

“kiagrade ĉiu detalo restas” *estas subpropozicio de “ekkonscii” kun nereкта formo (relativa tempo) kun as-formo (“restas”) aŭ is-formo por la aliaj agoj kiuj okazis dum la kunveno, do antaŭe (kvankam en la franca ne ĉiam la pluskvamperfekto estas uzata, interalie kiam la ago havas daŭron aŭ ripetigas : “barrait”, “penchait”).*

Plus tard, Mathilde avait demandé à Eric ce qu'il pensait de la façon dont les choses s'étaient déroulées : avait-elle été blessante, désobligeante, avait-elle dépassé les limites ? A voix basse, Eric lui avait répondu qu'elle avait agi comme aucun d'entre eux n'avait osé le faire, et c'était bien.

Pli malfrue, Mathilde demandis al Eric kion li opinias pri tio okazinta : ĉu ŝi estis ofenda, neĝentila, ĉu ŝi transiris la limon de tio permesata ? Mallaŭte, Eric respondis al ŝi ke ŝi agis tiun tagon kiel neniu el ili kuraĝus fari, kaj ke ŝi pravis.

Komentoj :

Temas pri nerektaj formoj (relativa tempo) kun as-formo kiam la ago okazas dum la demando (“opinias”), kun is-formo kiam la ago okazis antaŭ la respondo de Eric (“agis”).

Al la duon-rektaj formoj kun pluskvamperfekto “avait-elle été”, respondas la is-formo (relativa tempo).

Mathilde était revenue à cette scène parce que l'attitude de Jacques à son égard s'était modifiée, parce que plus rien ensuite n'avait été comme avant, parce qu'alors avait commencé un lent processus de destruction qu'elle mettrait des mois à nommer.

Mais à chaque fois revenait cette question : est-ce que cela suffisait, pour que tout bascule ?

Est-ce que cela suffisait pour que sa vie tout entière soit engloutie dans un combat absurde et invisible, perdu d'avance ?

Mathilde repensis pri tiu sceno ĉar la konduto de Jacques koncerne ŝin de tiam ŝanĝiĝis, ĉar nenio plu estis poste kiel antaŭe, ĉar tiam komenciĝis laŭgrada procezo de detruo kiun ŝi scipovis nomi nur monatojn poste.

Sed ĉiufoje revenis tiu demando : ĉu tio sufiĉas por ke ĉio subite ŝanĝiĝu ?

Ĉu tio sufiĉas por ke ŝia vivo estu entute englutita en batalon absurdan kaj nevideblan, jam de la komenco perditan ?

Komentoj :

La unua pluskvamperfekto ne vere indikas antaŭecon, sed anstataŭas la nun pli kaj pli eksmodan simplan preteriton de la franca lingvo.

La du sekvantaj pluskvamperfektoj indikas antaŭecon de nepreciza komenciĝo de la procezo ĉe la dato de la kunveno. Aldono de "tiam" sufiĉas.

Al la duon-rektaj formoj kun imperfekto (strange ne la pluskvamperfekto estas uzata en la franca, kio ŝanĝas la signifon al iu pli ĝenerala ideo) "cela suffisait", respondas la as-formo (relativa tempo).

La kondicionalo "mettrait" havas valoron de futuro de rakonto.

D'abord Jacques avait décidé que les quelques minutes qu'il lui consacrait chaque matin pour faire le point sur les priorités et les dossiers en cours constituaient une perte de temps ...

Unue Jacques decidis ke la kelkaj minutoj kiujn li dediĉas al ŝi ĉiun matenon por bilanci pri la ĉefaj aferoj kaj pri la momentaj projektoj, estas malŝparo de tempo ...

Komentoj :

La pluskvamperfekto "avait décidé" ne vere indikas antaŭecon, sed anstataŭas la simplan preteriton de la franca lingvo.

"constituaient" estas nereкта formo kun as-formo pro relativa tempo ("estas").

"consacrait" estas (nur konsekvence) nereкта formo kun as-formo pro relativa tempo ("dediĉas"), sed relative al la decido de Jacques. Sed la absoluta tempo ("dediĉis") ja estus akceptebla kun apenaŭa signifi-nuanco.

Puis il s'était appliqué à remettre systématiquement ses décisions en question, à demander des précisions, réclamer des preuves, des justifications, des arguments chiffrés, à émettre des doutes et des récriminations.

Puis il était venu tous les lundis au planning de l'équipe.

Puis il avait décidé de l'animer lui-même et, par conséquent, qu'elle pouvait s'occuper à autre chose.

Poste li sisteme kontraŭstaris ŝiajn decidojn, petis precizigojn, postulis pruvojn, pravigojn, argumentojn kun datumoj, esprimis dubojn kaj riproĉojn.

Poste li venis ĉiun lundon al la planado de la skipo.

Poste li decidis ke li mem animos ĝin kaj konsekvence, ke ŝi povos okupiĝi pri io alia.

Komentoj :

La diversaj pluskvamperfektoj anstataŭas la simplan preteriton de la franca lingvo.

"pouvait" estas nereкта formo kun os-formo pro relativa tempo ("povos"). Eble la as-formo estas akceptebla.

Elle avait pensé que Jacques reviendrait à la raison. Qu'il renoncerait à sa colère, laisserait les choses reprendre leur cours.

Cela ne pouvait pas déraiper, s'enrayer comme ça, pour rien. Cela n'avait aucun sens.

Ŝi pensis ke Jacques revenos al racia konduto. Ke li rezignos sian koleron, kaj lasos ĉion revojiĝi.

Tio ne povas fiaski, tiel misvojiĝi, pro nenio. Tio estas sensignifa.

Komentoj :

La kondicionalo en la franca havas valoron de futuro (la nivelo de certeco estas relative granda).

Fakte "reviendrait" estas nereкта formo kun os-formo pro relativa tempo ("povos").

Eĉ se ili troviĝas en aliaj frazoj, "renoncerait" kaj "laisserait" konsekvence estas nerektaj formoj kun os-formo pro relativa tempo ("rezignos" kaj "lasos").

Supozeble sinsekvas en la pripenso de Mathilde la du lastaj frazoj. Temas do pri duon-rekta formo kun as-formo pro uzo de relativa tempo.

Elle lui avait opposé la confiance qu'elle avait en lui.

Tout cela, peut-être, n'avait rien à voir avec elle. Jacques traversait une période difficile, éprouvait le besoin de retrouver ses marques, de reprendre la main sur les dossiers qu'il lui avait délégués depuis longtemps. Elle avait même imaginé qu'il était malade, une maladie tenue secrète qui le rongeait en silence.

Ŝi oponis al li sian fidon je li.

Ĉio ĉi, eble, neniel rilatas kun ŝi. Jacques travivas malfacilajn momentojn, bezonas trovi regeblan situacion, repreni dosierojn kiujn li delonge konfidis al ŝi. Ŝi eĉ konjektis ke li estas malsana, je malsano prisilentata kiu sekrete lin turmentas.

Komento :

Ĉio ĉi estas pripensata de Mathilde, do temas pri duon-rekta formo (relativa tempo kun as-formo). Pruve, sekvas nereкта formo "Ŝi eĉ konjektis ke li estas malsana, ..." (relativa tempo), kaj konsekvence ("turmentas").

Kutime kapvicas la nereкта formo kaj sekvas la duon-rektaj. En tiu ĉi ekzemplo oni devas senti de la komenco ke estas pripensata de Mathilde. Se estus fakto, estus uzata la preterito (absoluta tempo), sed erare.

[...] Ni Jacques ni le Directeur de la Communication ne lui avaient demandé son avis, ils s'étaient comportés tous les deux comme si elle était entrée par effraction ou par erreur et n'avait aucune raison d'être là.

[...] Nek Jacques nek la Direktoro de la Komunikado petis ŝian opinion, ili ambaŭ kondutis kvazaŭ ŝi ŝtele aŭ erare eniris kaj kvazaŭ ŝi nenial troviĝis tie.

Komentoj :

La du unuaj pluskvamperfektoj anstataŭas la simplan preteriton de la franca lingvo.

La lasta pluskvamperfekto "était entrée" indikas antaŭecon, sed la kunteksto kaj implice la vorto "nenial" esprimas tiun antaŭecon.

Ce jour-là elle avait compris que l'entreprise de destruction entamée par Jacques ne se limiterait pas à leur propre service, qu'il avait commencé à la discréditer ailleurs et avait tout pouvoir de le faire.

Tiun tagon ŝi komprenis ke la procezo de detruo komencita de Jacques ne limiĝos je ilia propra sekcio, ke li komencis misfamigi ŝin aliloke kaj estas prie ĉiopova.

Komentoj :

La pluskvamperfekto "avait compris" anstataŭas simplan preteriton.

La tri aliaj verboj estas nerektaj formoj (relativa tempo). Respektive : "limiterait" kondicionalo kun senco de futuro, post ŝia kompreno, "avait commencé" pluskvamperfekto, do antaŭ ŝia kompreno, kaj "avait" dum ŝia kompreno.

Il ne voyait pas de quoi elle parlait. Vraiment pas. Tout était parfaitement normal. Il faisait son travail. Point. Elle était bien placée pour savoir le montant du budget annuel qu'il gétait, le nombre de choses sur lesquelles il intervenait ou qui reposaient sur lui. Il n'avait pas de temps à perdre avec ses états d'âme. Il avait mieux à faire. Il lui incombait de contrôler, de vérifier, de prendre les bonnes décisions. Elle était compliquée. Elle compliquait tout. Qu'est-ce qu'il lui prenait ? Avait-elle quelque chose à se reprocher ? Elle avait sans doute besoin de vacances, l'année avait été difficile, il était normal qu'elle s'essouffle. D'ailleurs elle avait l'air tendue. Fatiguée. Personne n'est indispensable, elle le savait bien, elle n'avait qu'à prendre quelques jours, elle y verrait plus clair.

Li ne komprenis pri kio ŝi parolis. Absolute ne. Ĉio iras perfekte glate. Li okupiĝas pri sia laboro. Fina punkto. Ŝi estas en taŭga posteno por koni la nivelon de la buĝeto kiun li administras, la nombron de aferoj en kiuj li intervenas aŭ pri kiuj li taskas sin. Li ne disponas tempon malŝpareblan por ŝiaj mensovagoj. Li havas ion pli utilan por fari. Li devas prizorgi, kontroli kaj trafe decidi. Ŝi estas komplika. Ŝi komplikas ĉion. Kio okazas al ŝi ? Ĉu ŝi ion riproĉus al si ? Ŝi verŝajne bezonas ferion, ĉar la jaro estis malfacila, estas normale ke ŝi laciĝas. Cetere ŝi ŝajnas streĉita. Laca. Neniu estas nepre necesa, ŝi ja tion scias, ŝi nur ripozu kelkajn tagojn, kaj ŝi mense pli bonfartos.

Komentoj :

Laŭ gramatika vidpunkto, uzo de relativa tempo ne aplikeblas ĉe "parlait" ("Li ne komprenis tion, pri kio ŝi parolis").

La cetero de la alineo estas sinsekvo de duon-rektaj formoj, kun relativa tempo, rilate al lia tiam konstato kiun li laŭtvoĉe priskribas al Mathilde.

La formo "Elle n'avait qu'à prendre ..." estas pli ol invito en la kunteksto, kio implicas uzon de la volitivo.

Ĉe la lasta verbo "verrait", la kondicionalo havas sencon de futuro, post la efektiva ripozo.

[...] Au moment où il avait enfilé ses chaussures, elle avait ouvert les yeux. Il avait expliqué. Il ne trouvait pas le sommeil, il allait rentrer chez lui, ce n'était pas grave, d'ailleurs rien n'était grave, au fond. [...]

[...] Tuj post kiam li remetis siajn ŝuojn, ŝi malfermis la okulojn. Li tiam klarigis. Ke li ne povis dormi, ke li revenos hejmen, ke ne gravas, ke cetere nenio gravas [...]

Komento :

Temas pri nerektaj formoj (relativa tempo) sub formo de du frazoj. Respektive : "ne trouvait" do la nepovo dormi okazis antaŭ lia klarigo (tial la is-formo), "allait rentrer" kun signifo de baldaŭa futuro (do os-formo), kaj "n'était pas grave" dum lia klarigo ("ne gravas").

[...] Souvent, dans ce bien-être que lui procure la douche, elle retrouve des sensations d'avant, quand sa vie coulait comme de l'eau, quand elle n'avait d'autre préoccupation que de choisir le tailleur ou les chaussures qu'elle allait porter.

[...] Ofte, en tiu bonfarto provizita de la duŝado, ŝi retrovas sentojn de l' antaŭo, kiam ŝia vivo fluis samkiel akvo, kiam ŝi estis feliĉa iri al sia laboro, kiam ŝi havis neniun zorgon krom elekti la ensemblon aŭ la ŝuojn kiujn ŝi surmetis.

Komentoj :

Kvankam trompe influas la formo "allait porter" (baldaŭa estonteco) kaj la fakto ke la surmeto estas nereakta rezulto de la elekto (sub-propozicio), tamen laŭ gramatika vidpunkto, la absoluta formo estu uzata. Ĉar ĉio okazas en la estinteco, la is-formo taŭgas. La plej ĝusta traduko estus "estis surmetonta", sed tio estus neutile peza.

[...] Souvent elle a pensé qu'elle avait transmis à ses enfants une forme de gaieté, une aptitude à la joie. Souvent elle a pensé qu'elle n'avait rien de plus important à leur offrir que son rire, par delà l'infini désordre du monde.

[...] Ofte ŝi sentis ke ŝi transdonis specon de bonhumoro al siaj infanoj, iun kapablon ĝoji. Ofte ŝi supozis ke nenion pli gravan ol sian ridon ŝi povas donaci al ili, trans la senlima malordo de la mondo.

Komentoj :

La perfekto "a pensé" indikas ke la penso estas nedaŭra, kvazaŭ efemera sento aŭ supozo.

La aliaj verboj estas nerektaj formoj (relativa tempo). Respektive : "avait transmis" pluskvamperfekto, do antaŭ ŝia sento, kaj "n'avait" dum ŝia supozo mem.

[...] Quand il sort avec ses copains le samedi après-midi, Simon l'appelle pour lui dire où il est, s'inquiète de savoir si cela ne la dérange pas, si elle n'a pas besoin qu'il revienne plus tôt pour s'occuper des jumeaux, si elle ne veut pas se promener un peu, voir des amis ou aller au cinéma. [...] Elle leur a parlé. Au début. Elle leur a dit qu'elle avait des soucis à son travail, que ça allait passer. Plus tard elle a essayé de raconter, leur expliquer la situation, la manière dont elle s'était laissé piéger, peu à peu, et combien il lui était difficile d'en sortir. [...]

[...] Kiam li eliras kun kamaradoj sabate posttagmeze, Simon alvokas ŝin por diri kie li troviĝas, informiĝas por scii ĉu tio ĝenas ŝin, ĉu ŝi bezonas ke li revenos pli frue por zorgi pri la ĝemeloj, ĉu ŝi preferus iom promeni, viziti amikojn aŭ iri al la kinejo. [...] Ŝi parolis al ili. Ĉe la komenco. Ŝi diris ilin ke ŝi havas zorgojn pri la laboro, ke ĉio solviĝos. Poste ŝi provis rakonti, ekspliki la situacion, la manieron laŭ kiu ŝi estis kaptita, iom post iom, kaj kiom estas malfacile eliri el tio. [...]

Komentoj :

La tri neaj formoj "ne la dérange pas", "n'a pas besoin" kaj "ne veut pas" estus netaŭgaj en Esperanto (ĉefe post uzo de la binara "ĉu").

Krome tiuj verboj estas nerektaj formoj de "scii" kun as-formo pro relativa tempo ("ĝenas", "bezonas") aŭ us-formo ("preferus") kiel nuanco de ĝentileco (la as-formo estus akceptebla).

La subjunktivo "qu'il revienne" estas subpropozicio kun relativa tempo (je la dua nivelo). Taŭgas la os-formo ĉar la reveno okazos post la bezono.

Sinsekvas diversaj verboj kun uzo de relativa tempo.

Elle a cru qu'elle pouvait résister.

Elle a cru qu'elle pouvait faire face.

Elle s'est habituée, peu à peu, sans s'en rendre compte. Elle a fini par oublier la situation antérieure, et le contenu même de son poste, elle a fini par oublier qu'elle travaillait dix heures par jour sans lever la tête.

Elle ne savait pas que les choses pouvaient basculer ainsi, sans retour possible.

Elle ne savait pas qu'une entreprise pouvait tolérer une telle violence, aussi silencieuse soit-elle. [...]

Ŝi kredis ke ŝi povos rezisti.

Ŝi kredis ke ŝi povos adaptiĝi.

Ŝi iom post iom al kutimiĝis, senkonscie. Kaj ŝi forĝis la antaŭan situacion, kaj la utilecon mem de sia posteno, fine forĝis ke ŝi laboras po dek horojn tage sen levi la kapon.

Ŝi ne sciis ke tio povos tiel misevolui, neretroireble.

Ŝi ne sciis ke entrepreno povas toleri tian violenton, eĉ se silentan. [...]

Komentoj :

Kvinfoje temas pri uzo de relativa tempo ĉe la subpropozicio. La ĉef-propozicioj de la du unuaj esprimas pli sendaŭrajn mensajn agojn, per uzo de la perfekto anstataŭ la imperfekto ("Elle a cru"). Tial la relativa senco estas la futuro ("povos").

Pri la kvara, ŝajnas ke la franca sugestas du eblojn : ĉu temas pri ŝia persona situacio (retenita solvo : "ke tio povos tiel misevolui"), ĉu pri ĝenerala fakto kiu koncernas multajn homojn (neretenita solvo : "ke tio povas tiel misevolui").

Il avait oublié à quel point il était vulnérable. Est-ce que c'était ça, être amoureux, ce sentiment de fragilité ? Cette peur de tout perdre, à chaque instant, pour un faux pas, une mauvaise réplique, un mot malencontreux ? Est-ce que c'était ça, cette incertitude de soi, à quarante ans comme à vingt ? Et dans ce cas, qu'existait-il de plus pitoyable ?

Li estis forgesinta kiagrade li estas ŝanceblebla. Ĉu esti amema estas tio, ĉu tiu sento de fragileco ? Ĉu tiu timo ĉion perdi, je ĉiu momento, pro mispaŝo, pro fuŝa respondo, pro mallerta vorto ? Ĉu estas tio, tiu manko de memfido, kiam kvardekjara same kiel dudek ? Kaj tiukaze, ĉu ekzistas io pli pita, pli vana ?

Komentoj :

La pluskvamperfekto "avait oublié" ne indikas antaŭecon sed konstaton de efektiva (int) fakto (modifo de la antaŭa analizo-versio, eĉ diferencigo de la eldonita traduko).

La sekvantaj verboj estas ĉu nerektaj ĉu duon-rektaj formoj, rilate al tio kion li provis rememori, do la tempo estas relativa (as-formo). Cetere la pripensoj estas ĝeneralaj kaj ne ligitaj al specifa momento, do sama konkludo : as-formo

Il a prévenu Rose qu'il prenait sa garde, elle lui a donné la première adresse de vive voix : forte fièvre, symptômes grippaux. Elle l'a rappelé quelques minutes plus tard, elle voulait savoir s'il pouvait prendre le secteur six en plus du quatre, sur lequel il était planifié. [...]

Li sciigis al Rose ke li estas denove disponebla, ŝi laŭtvoĉe indikis lian unuan adreson : forta febro, simptomoj de gripo. Ŝi vokis lin kelkajn minutojn poste, ŝi volis scii ĉu li povus preni la sektoron ses krom la kvar, kiu jam estis planita por li. [...]

Komentoj :

Temas pri du nerektaj formoj kun uzo de relativa tempo (prezenco). La kondicionalon de la dua ("povus") pravigas la peta ĝentileco.

Il vient de se garer sur une livraison, au pied de l'immeuble où on l'attend. Il regarde son téléphone, il sait ce qu'il espère. Il sait que toute la journée il va surveiller l'écran de son portable, guetter le signal des SMS. [...]

Li ĵus parkumis sur liverado-areo, piede de la domego kie iu atendas lin. Li rigardas al sia telefono. Li scias kion li esperas. Li scias ke la tutan tagon li kontrolos la ekranon de sia poŝ-telefono, li gvatos la bildeton de SMS. [...]

Komentoj :

Notindas la ĵusa preterito (“vient de se garer”) kaj la baldaŭa futuro (“va surveiller” kiu tie insistas pri la nekapablo sin reteni).

La verbo “esperas” estas subpropozicioj kun absoluta tempo.

La verboj “kontrolos” kaj “gvatos” estas subpropozicioj kun relativa tempo.

Il va rejoindre son premier patient. Quitter le parfum de Lila qui flotte dans l'air. Laisser les fenêtres entrouvertes.

Li estas vizitonta sian unuan pacienton. Li forestos la parfumon de Lila kiu ŝvebas en la aero. Li lasas la glaçon duone malfermita.

Komentoj :

La baldaŭa futuro (“va rejoindre”) estas komuna al la tri verboj je infinitivo. La tri manieroj traduki enkondukas kronologion.

La lasta frazo havas evidentan metaforan signifon.

[...] La femme a l'air de se calmer, Mathilde lui propose d'aller lui chercher un peu d'eau ou quelque chose à manger au distributeur. La femme recommence à s'agiter, elle va être en retard, elle ne peut pas, elle ne peut pas remonter dans le métro, elle vient juste de trouver du travail par une agence d'Intérim, oui, elle est claustrophobe, mais d'habitude ça va, elle y arrive, elle pensait qu'elle pouvait y arriver.

[...] La virino ŝajne trankviliĝas, Mathilde proponas ke ŝi alportos iom da akvo aŭ ion manĝeblan el la aŭtomata disdonilo. La virino denove maltrankviliĝas, ŝi estos malfrua, ŝi ne povas, ŝi ne povas reiri en la metroon, ŝi ĵus trovis laboron en agentejo de Intérim, efektive ŝi suferas klaŭstrofobion, sed kutime ŝi sukcesas, ŝi supozis ke ŝi sukcesos.

Komentoj :

Notindas la ĵusa preterito ("vient juste de se trouver") kaj la baldaŭaj futuroj ("aller lui chercher" kaj "va être").

La verboj "alportos" kaj "sukcesos" estas subpropozicioj kun relativa tempo. Estas notinde ke al la imperfekto "pouvait y arriver", respondas la futuro "sukcesos".

La dua frazo estas duon-rekta formo ekde sia dua propozicio ĝis sia fino ("elle va être en retard"), kvankam la ĝenerala prezenco ne evidentigas tion. Ne Mathilde rakontas sed ja parolas la virino.

Il est descendu dans le métro pour une crise de tétanie à la station *Charonne*. Les pompiers avaient renvoyé l'appel à la base, ils étaient débordés à cause d'un incendie important dans leur secteur. [...]

[...] Il était garé en double file, il ne pouvait pas rester. Un agent lui a promis qu'il la conduirait jusqu'au taxi lorsqu'elle aurait récupéré.

Li malsupreniris en la metroon pro krizo de tetanio en la stacio *Charonne*. La fajro-brigadistoj estis resendintaj la alvokon al la centralo, ĉar ili estis tro okupataj pro grava incendio en tiu urbo-parto. [...]

[...] Ĉar lia veturilo estis duavice misparkita, li ne povis resti plu. Agento promesis ke li akompanos ŝin ĝis taksio kiam ŝi pli bone fartos.

Komentoj :

La pluskvamperfekto "avaient renvoyé" indikas antaŭecon ol la interveno de Thibault. Sufiĉas indiki ke la ago resendi estas finita (per int).

La imperfekto (kun esprimo de daŭro) "étaient débordés" estas formo duon-rekta. Kronologie, la unua kaŭzo estas la incendio ("à cause" / "pro"), poste la okupateco de la fajro-brigadistoj, kaj fine la resendo de la alvoko (kvankam tiu ĉi estas esprimita per pluskvamperfekto pro antaŭeco ol la alveno de Thibault en la stacion). La esperantlingva versio uzas la absolutan tempon kun aldono de "ĉar" ("ĉar ili estis tro okupataj") por klare indiki la sinsekvon, des pli ke la ago esti okupata (at) ne estas finita do daŭras eĉ post la resendo de la alvoko.

La kondicionaloj de la lasta frazo havas signifon de futuro.

La verbo "akompanos" estas subpropozicio kun relativa tempo, kaj konsekvence ankaŭ la sammomenta "fartos".

[...] La porte vitrée du service logistique était ouverte, Laetitia se tenait assise à son bureau, le combiné du téléphone collé à l'oreille, il lui a semblé qu'elle évitait son regard.

Quelque chose ne tournait pas rond, quelque chose échappait au rituel.

Quelque chose s'était étendu, propagé.

[...] La vitra pordo de la administrada servo estis malfermita, kaj Laetitia sidis en sia oficejo, kun la telefonaparato ĉe sia orelo, ŝajnis al ŝi ke ŝi evitas ŝian rigardon.

Io ne estas normala, io ne estas kutima.

Io etendiĝis, propagiĝis.

Komentoj :

Post la formo “ŝajni ke”, la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo “ŝajni”.

Ĉu la du lastaj frazoj estas faktoj (absoluta tempo), ĉu longigo de tio ŝajnanta al Mathilde (relativa tempo laŭ speco de duon-rekta formo), ne estas facile decidebla ĉar la franca lingvo ne permesas distingi. La traduko proponata kongruas kun la dua alternativo (do : “estas”, “etendiĝis”, “propagiĝis”).

Il est arrivé derrière elle, il portait son costume noir, celui des grands jours, il a regardé l'heure à la pendule murale, lui a demandé si elle avait eu un problème. Tout le monde la cherchait partout depuis deux heures. Sans attendre sa réponse, il s'est inquiété de savoir si elle allait mieux, si elle s'était reposée, parce que vous avez l'air vraiment fatiguée, Mathilde, ces derniers temps. [...]

Li alvenis malantaŭ ŝi, li surhavis sian nigran kostumon, tiun por gravaj okazoj, li rigardis la horon de la murhorloĝo, demandis ŝin ĉu ŝi renkontis problemon. Ĉiuj serĉis ŝin de du horoj. Sen atendi ŝian respondon, li demandis ŝin ĉu ŝi fartas pli bone, ĉu ŝi ripozis, ĉar vi mienas vere laca, Mathilde, de kelka tempo. [...]

Komentoj :

Tri subpropozicioj enkondukataj per “ĉu”, laŭ nerekta formo kaj kun relativa tempo rilate al lia demando, respektive “renkontis”, “fartas” kaj “ripozis”.

La verbo “cherchait” estas duon-rekta formo kun relativa tempo. Tamen, ĉar la “du horoj” estas finitaj, la preterito (“serĉis”) estas uzata.

Sekvas la kvazaŭ-rekta formo “mienas” (kun relativa tempo ankaŭ en la franca).

Corinne Santos l'a regardée. Les yeux de Corinne Santos disaient j'ai pitié de vous, je n'y suis pour rien, si ce n'était pas moi ce serait une autre.

Corinne Santos rigardis ŝin. La okuloj de Corinne Santos diris mi kompatas vin, ne mi kulpas, se ne mi, estus iu alia.

Komentoj :

Sinsekvas la kvazaŭ-rektaj formoj "kompatas", "kulpas", "se ne mi" (kun relativa tempo ankaŭ en la franca).

En la franca, la verbo esti intervenas en la du partoj de la kondiĉo, sed sub du malsamaj formoj (la imperfekto "était" kaj la kondicionalo "serait"). Ĉar en Esperanto ambaŭ partoj uzas la kondicionalon "estus", ne utilas ĝin ripeti.

[...] Avec précaution, Patricia Lethu lui a expliqué combien l'entreprise est devenue un univers complexe, soumis à la pression concurrentielle, à l'ouverture des marchés, sans parler des directives européennes, combien tout cela, ici comme ailleurs, contribue à générer de la tension, du stress, des conflits. Elle lui a décrit la dure réalité de l'entreprise comme si Mathilde sortait du couvent ou se réveillait d'un long coma. Dans un soupir, Patricia Lethu a ajouté que les DRH étaient tous confrontés aux mêmes difficultés, un vrai casse-tête, et cette pression sur les objectifs, omniprésente, ce n'est pas facile, ce n'est facile pour personne. Il fallait s'armer, rester compétitif, ne pas se laisser distancer. Parce qu'il fallait bien l'admettre, les salariés les plus faibles se retrouvaient vite en première ligne. D'ailleurs, l'entreprise réfléchissait beaucoup sur ces sujets et envisageait de mettre en place des séminaires avec l'aide d'un consultant externe.

[...] Singarde, Patricia Lethu klarigis al ŝi kiom entrepreno fariĝis kompleksa mondo, submetita al la premo de la konkurenco, al la malfermo de la merkato, sen paroli pri la eŭropaj direktivoj, kiom ĉio ĉi, ĉi tie same kiel aliloke, kontribuas en genero de streĉiteco, de streso, de konfliktoj. Ŝi priskribis al ŝi la senkompatan realecon de la entrepreno kvazaŭ Mathilde ĵus elirus el monaĥejo aŭ vekigus de longa komato. En suspiro, Patricia Lethu aldonis ke ĉiu DRH estas konfrontita al la samaj malfacilaĵoj, vera kap-rompo, kaj al tiu premo de la cel-defioj, konstante, ke ne estas facile, ke estas facile por neniu. Endas sin fortigi, plu resti konkurenca, ne lasi sin distanciĝi. Ĉar, tion oni rekonu, la plej psike malfortaj salajritoj rapide retroviĝas je fronta linio. Krome, la entrepreno intense pripensas tiujn temojn, kaj planas starigi seminariojn helpe de ekstera fak-interveno.

Komentoj :

La verboj "est devenue" kaj "contribue" estas kvazaŭ-rektaj formoj. Se ili estus nerektaj, la verboj aperus en la formoj "était devenue" kaj "contribuait", kio havus la saman signifon. En Esperanto, la tempo estas relativa, rilate al la klarigo de Patricia Lethu.

La imperfektoj "sortait" kaj "réveillait" havas signifon de kondicionalo.

Poste, strange sinsekvas formoj kvazaŭ-rekta ("ce n'est pas facile"), nerekta ("étaient tous confrontés") kaj duon-rektaj (la aliaj verboj). En Esperanto, por ĉiuj ĉi la tempo estas relativa (as-formo).

La volitiva formo je la tria persono ("il fallait bien l'admettre") estas evidenta.

Patricia Lethu suggérait la patience. Avec le temps, les choses allaient revenir dans l'ordre, trouveraient une issue. Il fallait admettre que rien n'était immuable, accepter le changement, rechercher les ajustements, être capable de se repositionner. Il fallait accepter de se remettre en question. Le moment était peut-être venu pour Mathilde de réfléchir à une nouvelle orientation, à une mise à jour de ses compétences, de faire un bilan. La vie nous obligeait parfois à prendre les devants. Jusqu'ici Mathilde avait su s'adapter. Patricia Lethu était confiante, les choses allaient s'arranger, elle lui avait serré la main.

Patricia Lethu konsilis paciencon. Post tempo, la afero revojiĝos, trovos elir-solvon. Oni devas akcepti ke nenio estas definitiva, konsenti ŝanĝojn, esplori novajn direktojn, esti kapabla adaptiĝi. Estas necese serĉi mem evoluojn. Eble alvenas la momento por Mathilde pripensi novan karieron, ĝisdatigi sian kompetentecon, fari bilancon. Foje la vivo devigas onin antaŭ-agi. Ĝis nun Mathilde scipovis adaptiĝi. Patricia Lethu estis fidema, ĉio normaliĝos, ŝi manpremis ŝin.

Komentoj :

Ekde la dua frazo ĝis la antaŭlasta estas duon-rekta formo kun relativa tempo. La tuto estas diraĵo de Patricia Lethu. La proksimaj futuroj rilate al la preterito "allaient revenir" kaj "allaient s'arranger" estas futuroj en la relativa tempo ("revojiĝos", "normaliĝos"). La kondicionalo "trouveraient" estas futuro ("trovos"), kun eble apenaŭa dubo. Al la imperfekto respondas la prezenco en Esperanto. Al la pluskvamperfekto "avait su" respondas la preterito "scipovis" (cetere kongrua kun la formulo "Ĝis nun").

En la lasta frazo, la unua kaj tria propozicioj estas en absoluta tempo, la dua propozicio en relativa tempo.

Estas notinde ke en la franca la akuzativo de "on" ("oni") estas "nous" ("onin"). Tial "la vie nous obligeait" estas tradukita per "la vivo devigas onin".

Dans la mesure où la confiance a été entamée, compte tenu des enjeux majeurs auxquels le Marketing est aujourd'hui confronté, il est normal que Jacques prenne ses dispositions, réorganise le service, parce l'entreprise doit répondre à une demande qui évolue sans cesse, se donner les moyens de l'anticiper, de gagner des parts de marché, de renforcer ses positions à l'international, parce que l'entreprise ne peut se contenter de suivre, parce que l'entreprise doit être à la pointe. C'est ce que Patricia Lethu lui a expliqué lors de leur deuxième entretien. [...]

Se konsidere ke la fido estis difektita, ĉe la gravaj defioj kiujn nuntempe alfrontas la Merkato-analizo, estas normale ke Jacques antaŭ-decidu, reorganizu la sekcion. Ĉar la entreprenon devas respondi al mendo kiu senĉese evoluas, sin provizi per rimedoj por ĝin anticipi, gajni novajn partojn de la merkato, firmigi sian pozicion je internacia skalo, ĉar la entreprenon ne povas nur sekvi, ĉar la entreprenon devas iniciati. Tion Patricia Lethu klarigis al ŝi okaze de ilia dua renkontiĝo. [...]

Komentoj :

La alineo estas preskaŭ entute je kvazaŭ-rekta formo. Parolas Patricia Lethu, kion konfirmas la lasta frazo. Do ambaŭ lingvoj uzas la relativan tempon. Plej ofte temas pri asertoj ne ĉiuj ligitaj al preciza momento, do taŭgas la prezenco.

De tiu ĝenerala kvazaŭ-rekta formo, aperas kelkaj subpropozicioj kun nereakta formo ("antaŭ-decidu, reorganizu"). Estas notinde ke tiuj du estas subjektoj de "estas normale ke". La relativa tempo estas pravigebla analoge al la formo "ŝajni ke" (PAG §270 (1)).

Il lui a toujours semblé que l'entreprise était un lieu neutre, dénué d'affects, où ces choses-là n'avaient pas de place.

Ŝi ĉiam supozis ke entrepreno estas neŭtrala loko, senafekta, kie tiaj aferoj neniel konvenas.

Komento :

Du nerektaj formoj (relativa tempo) kun as-formo. La dua estas konsekvenco de la unua.

La violence est venue il y a quelques semaines, quand elle a compris jusqu'où Jacques était capable d'aller. Quand elle a compris que cela ne faisait que commencer.

La violento aperis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam ŝi komprenis ĝis kiu grado Jacques kapablas iri. Kiam ŝi komprenis ke tio nur komenciĝas.

Komento :

Du nerektaj formoj (relativa tempo) kun la prezenco en Esperanto. La unua subpropozicio estas enkondukata de la subjunkciaĵo "ĝis kiu grado".

Sur le moment, les images l'avaient soulagée.

Ensuite, Mathilde avait eu peur. Que quelque chose lui échappe, l'emporte, quelque chose qu'elle ne pourrait empêcher.

Les images étaient si nettes, si précises. Presque réelles.

Elle avait eu peur de sa propre violence.

En tiu momento, la bildoj trankviligis ŝin.

Poste, Mathilde timis. Ke ion ŝi ne regos, ke delogos ŝin io, kion ŝi ne povos malhelpi.

La bildoj estis tiel netaj, tiel precizaj. Preskaŭ realaj.

Tiam ŝi timis sian propran violenton.

Komentoj :

La adverboj "Ensuite" / "Poste" kaj aldono de "Tiam" sufiĉas por esprimi la kronologion (uzo de la pluskvamperfekto en la franca).

La dua frazo de la dua alineo estas nereкта forma (relativa tempo) rilate al la timo de Mathilde (en la antaŭa frazo), do kun la futuro. Estas notinde ke en la franca la du unuaj verboj "échappe" kaj "emporte" estas la prezenco de la subjunktivo anstataŭ la ne plu uzata pasinteco de la subjunktivo (konsekvence la tipe franclingva absoluta tempo ĉe nereкта forma, ŝajnas esti relativa tempo).

La lasta verbo de la frazo "pourrait" estas kondicionalo kun signifo de nepreciza futuro (absoluta tempo kvankam simila al relativa tempo).

A onze heures, il a appelé Rose pour lui demander si le dispatcheur avait l'intention de lui faire faire la navette toute la journée entre les deux secteurs. Il voulait bien se montrer conciliant, mais Francis devait veiller à rationaliser un minimum ses déplacements surtout quand il s'agissait d'urgences classées U4 par le régulateur.

Je la dekunua, li alvokis al Rose por demandi ĉu la planisto intencas ir-reirigi lin inter ambaŭ sektoroj la tutan tagon. Li bonvolas elmontri komplezemon, sed Francis devus zorgi pri optimizado de lia veturado, des pli kiam temas pri urĝoj de la kategorio U4 laŭ la reguligisto.

Komentoj :

En la unua frazo, nereкта formo (relativa tempo) kun la prezenco en Esperanto. La subpropozicio estas enkondukata de "ĉu".

Sekve "bonvolas" kaj "temas" estas duon-rektaj formoj (relativa tempo).

Same "devus" kun nuanco de io neefektiva ("mais" / "sed"). Evidente "devas" estus akceptebla. Verŝajne la kondicionalo "devrait" povus esti alternativo en la franca kun nuanco de riproĉo.

Il a longtemps cru que la ville lui appartenait. Sous prétexte qu'il en connaissait la moindre rue, la plus petite impasse, les dédales insoupçonnables, le nom des nouvelles artères, les passages sans lumière, et ces quartiers surgis de nulle part aux abords de la Seine.

Li longe kredis ke la urbo apartenas al li. Sub la preteksto ke li konas ĉiujn el ĝiaj stratoj, la plej etan sakstraton, la nekonatajn sinuaĵojn, la nomon de la novaj arterioj, la malhelajn pasejojn, kaj tiujn kvartalojn subite kreskintajn borde de Sejno.

Komentoj :

En la unua frazo, nereкта formo (relativa tempo) kun la prezenco en Esperanto.

Sekve "konas" estas nereкта formo (relativa tempo). La dua frazo estas kvazaŭ sekvo de la unua.

Tamen pri la signifo de "Sous prétexte qu'il en connaissait ...", eblas heziti. Ĉu temas pri la "preteksto" de lia kredo, ĉu de lia kredo en la aparteno de la urbo ? Konsekvence ĉu la tempo estas respektive absoluta ("konis") ĉu relativa ("konas") ? Nur eblas arbitra decido, laŭ tio pli verŝajna.

Estas notinde ke la participo "surgis" havas aktivan signifon ("ayant surgi").

Aujourd'hui, il faut faire semblant.

Avoir l'air occupé dans un bureau vide.

Avoir l'air occupé sans ordinateur, sans connexion à Internet.

Avoir l'air occupé quand tout le monde sait qu'elle ne fait rien.

Hodiaŭ, ŝi afektu laboradon.

Ŝi afektu okupatecon en malplena oficejo.

Ŝi afektu okupatecon sen komputoro, sen konekto al Interreto.

Ŝi afektu okupatecon dum ĉiu scias ke ŝi faras nenion.

Komentoj :

La tria persono ne ekzistas ĉe la imperativo. Aliflanke estas evitinde konservi la sinsekvon de infinitivoj.

Uzo de la volitivo estas solvo, sed kun malavantaĝo ke ĝi necesigas elekton de subjekto ("ŝi" sin trudas).

La lasta propozicio estas nereкта formo kun relativa tempo (prezenco).

La voix l'informe qu'un conseiller va lui répondre dans quelques minutes. Mathilde sourit. Elle tente d'identifier la musique d'attente, elle connaît cet air, elle ne connaît que ça, elle ne trouve pas.

Elle attend.

Au moins elle aura parlé à quelqu'un.

La voĉo informas ke konsilanto respondos al ŝi post kelkaj minutoj. Mathilde ridetas. Ŝi provas identigi la atendo-muzikon, ŝi konas tiun melodion, ŝi tre bone konas ĝin, sed ne trovas.

Ŝi atendas.

Almenaŭ, ŝi estos parolinta kun iu.

Komentoj :

La baldaŭa futuro "va lui répondre" (cetere nereкта formo kun relativa tempo) estas esprimita en la precizigo "post kelkaj minutoj", kio sufiĉas.

La antaŭo-futuron "aura parlé" (cetere duon-rekta formo kun relativa tempo) esprimas la sufikso "int" (post la parolado, do ideo de plenumo de tio dezirata).

— Jacques Pelletier s'est plaint que vous étiez agressive à son égard. Il dit qu'il est devenu très difficile de communiquer avec vous. Que vous montrez des signes forts de résistance, que vous n'adhérez plus aux orientations du service, ni à celles de l'entreprise.

— Jacques Pelletier riproĉis ke vi estas agresema kontraŭ li. Li diras ke komuniki kun vi fariĝis malfacile. Ke vi elmontras fortajn signojn de rezistemo, ke vi ne plu samcelas kiel la orientiĝoj de la sekcio, nek kun tiuj de la entrepreno.

Komentoj :

Kvar nerektaj formoj kun relativa tempo.

La infinitivo "komuniki" estas subjekto de "fariĝis"

— Ecoutez, cela doit faire trois mois que je n'ai eu une conversation digne de ce nom avec Jacques Pelletier, et plusieurs semaines qu'il ne m'a pas adressé la parole. Sauf ce matin, pour m'expliquer que mon bureau avait été transféré. [...]

— Aŭskultu, jam de tri monatoj mi ne havas konversacion indan je tiu nomo kun Jacques Pelletier, kaj de pluraj semajnoj li eĉ ne alparolas min. Krom ĉi tiun matenon, por klarigi ke mia oficejo estis translokita. [...]

Komentoj :

Eĉ se la nekonversado aŭ la ne-alparolo okazis en pasinta momento ĝis nun (ĝis la momento de la dialogo), oni uzu la prezencon post "de + esprimo de daŭro" konsiderante ke tio plu daŭras ankaŭ en la nuno (PIV / vidu "de" / ekzemploj).

Ĉe la nereкта formo, la relativa tempo de la pluskvamperfekto estas la preterito ("estis").

Cela a commencé quelques jours plus tôt. Il a jeté tout le contenu du réfrigérateur sous prétexte qu'il était empoisonné, et n'a cessé de vérifier que le gaz n'était pas ouvert. [...] Au matin, après avoir expliqué à sa femme que les forces du mal s'infiltraient chez eux par le fil du téléphone et les conduits d'aération, il s'est enfermé dans la salle de bain. [...] Il lui a dit qu'il allait devoir mettre fin à ses jours, pour elle et pour l'enfant, pour les protéger. Il veut qu'elle quitte l'appartement, qu'elle parte loin, le plus loin possible, pour ne pas être contaminée par son sang. Il attend qu'elle s'en aille.

Tio komenciĝis kelkajn tagojn pli frue. Li forĵetis entute la enhavon de la fridujo pretekste ke ĝi estas toksita, kaj senĉese kontrolis ĉu la gasaparato estas malsaltita. [...] En la mateno, klariginte al sia edzino ke la fortoj de l' malbono enŝteliĝas en ilian hejmon laŭ la telefon-dratoj kaj tra la tuboj de la ventolilo, li enfermiĝis en la banĉambro. [...] Li diris al ŝi ke li ĉesigu sian vivon, kaj por ŝi kaj por la infano, por ilin protekti. Li volas ke ŝi forlasu la loĝejon, ke ŝi iru malproksimen, plej malproksimen, por ne esti toksita de lia sango. Li atendas ke ŝi foriru.

Komentoj :

La propozicio “estas toksita” estas subpropozicio kun nereкта formo (relativa tempo) de “pretekste” (evidente ne de la ago forĵeti).

Sekvas aliaj nerektaj formoj, i.a. la lastaj estas volitivaj kun signifo de nepra memdevo (“qu'il allait devoir”) aŭ de nerifuzinda konsilo.

[...] Très vite il avait compris qu'elle ne pouvait l'aimer qu'à l'horizontale, ou quand il la tenait par les hanches au-dessus de lui. Ensuite, il la regardait dormir de l'autre côté du lit, d'un sommeil profond, lointain. Dès le début, il s'était heurté à cet air d'indifférence qu'elle opposait à toute tentative d'effusion, à son visage fermé des lendemains, à son humeur maussade des fins de week-end, à son inaptitude aux plus élémentaires adieux.

[...] Tre rapide li komprenis ke ŝi povas ami lin nur horizontale, aŭ kiam li tenas ŝin per la koksoj super si. Poste, li rigardis ŝin dormi aliflanke de la lito, laŭ dormo profunda, malproksima. Ekde la komenco, li koliziis kun tiu indiferenteco kiun ŝi oponis kontraŭ ĉiuj provoj de am-elmonstro, kontraŭ ŝia vizaĝo senreaga en la morgaŭoj, ŝia malgaja humoro en dimanĉaj vesperoj, ŝia nekapablo je la plej simplaj adiaŭoj.

Komentoj :

La unua substrekita verbo “povas” kaj konsekvence la dua “tenas” estas nerektaj formoj (relativa tempo).

La pluskvamperfekto “avait compris” anstataŭas la preteriton (preciza momento) dum la imperfektoj havas signifon de ago kun daŭro, kion perfekte esprimas la prezenco de la relativa tempo en Esperanto.

La lasta verbo “oponis” rilatas al subpropozicio kun absoluta tempo.

Laetitia ne parles pas à voix basse. Elle veut qu'on l'entende. Un peu plus, elle se posterait dans le couloir avec un porte-voix pour crier au scandale.

Laetitia ne parolas mallaŭtvoĉe. Ŝi volas ke oni aŭdu ŝin. Preskaŭ ŝi starus en la koridoro kun voĉtubo por elkrii pri la skandalo.

Komentoj :

Nerekta formo kun ideo de volo uzas la volitivon ("aŭdu"), anstataŭ la subjunktivo en la franca.

La kondicionalo "posterait" indikas ke la staro en la koridoro estas neprobabla, eĉ se mankas malmulto. Same en Esperanto taŭgas la kondicionalo.

A l'occasion de son entretien de recrutement, Mathilde n'avait pas mentionné qu'elle était veuve. A Jacques comme aux autres, elle avait dit qu'elle élevait seule ses enfants. C'était la vérité. Elle refusait la pitié, la compassion, elle ne supportait pas l'idée qu'on ait pour elle des précautions et des indulgences, elle détestait ces mots.

Okaze de sia varbo-renkonto, Mathilde ne menciis ke ŝi estas vidvino. Al Jacques kaj same al la aliaj, ŝi tiam diris ke ŝi edukas siajn infanojn sole. Tio estis vera. Ŝi rifuzis la kompaton, la asiston, ŝi ne toleris la ideon laŭ kiu oni elmontrus al ŝi atentojn aŭ indulgojn, ŝi malŝatis tiujn vortojn.

Komentoj :

La du unuaj substrekitaj verboj estas nerektaj formoj kun relativa tempo.

La subjunktivo "ait" ne indikas dubon sed supozon, do taŭgas la kondicionalo. La finaĵo "is" estus akceptebla (absoluta tempo), sed supoze ke elmontro jam efektive okazis, kio ne estas evidenta ĉar momente estas nur "vortoj" malŝatindaj.

[...] Au contraire, il lui semblait maintenant qu'à la surface des choses affleuraît une violence sourde que la ville ne pouvait plus contenir.

[...] Male, ŝajnis al li ke alsurfaciĝas obtuza violento kiun la urbo ne plu povas regi.

Komentoj :

Post la formo "ŝajni ke", la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo "ŝajni".

Sekve la verbo "pouvait" estas nereкта formo kun relativa tempo ("povas") ĉar tiu lasta propozicio ja estas parto de la ŝajno, kion diras ne la franclingva frazo sed la kunteksto. Se ne estus tiel, la tempo estus absoluta ("povis") kaj la signifo estus alia.

Il lui a dit qu'il préférerait l'envoyer à l'hôpital, le temps de mettre en place un suivi avec l'assistance sociale. Qu'ensuite elle pourrait rentrer chez elle, avec la visite quotidienne d'une aide ménagère.

De ses deux mains, Mme Driesman s'est accrochée à la table, elle n'a rien voulu savoir. Il était hors de question qu'elle quitte son appartement.

Il ne pouvait l'obliger. Il n'a pas le droit.

Il est remonté dans la voiture après avoir promis de repasser demain. Avant de démarrer, il a appelé Audrey pour que la base s'occupe de faire un signalement. [...]

Li diris al ŝi ke li preferas sendi ŝin al la hospitalo, ĝis starigo de sociala asistado. Ke poste ŝi povos reveni hejmen, kun la ĉiutaga vizito de domhelpistino.

S-ino Driesman ambaŭmane al kroĉiĝis al la tablo, ne cedis. Ŝi tute ne intencis foriri de sia loĝejo.

Li ne povis devigi ŝin. Li ne rajtas.

Li revenis al ŝia veturilo, promesinte ke li revenos la morgaŭon. Antaŭ ol startigi, li alvokis al Audrey por ke la centralo registru la problemon. [...]

Komentoj :

En la unua alineo sinsekvas du nerektaj formoj kun relativa tempo. La kondicionalo "pourrait" havas signifon de futuro.

Ĉu la tri propozicioj entute substrekitaj estas esprimo de fakto kun absoluta tempo ("intencis", "povis" kaj "rajtas" kiel antaŭe "alkroĉiĝis"), ĉu duon-rekta kun relativa tempo de io pripensata de S-ino Driesman aŭ eĉ de Thibault ("intencas", "povas" kaj "rajtas") ne estas evidenta. La unua alternativo estas la pli evidenta.

En la lasta alineo troviĝas du nerektaj formoj kun relativa tempo. Pri la unua estas notinde ke la traduko uzas rimedon (relativa futuro) iom malproksiman de la franca lingvo (infinitivo) tial, ke en Esperanto "promesi" postulas subpropozicion per "ke", dum en la franca, tiu "que + subjunktivo" estas anstataŭigita per infinitiva konstruo, se la ĉefa kaj la suba propozicioj havas la saman subjekton, kio ne ekzistas en Esperanto. La dua nereкта formo estas en volitivo ("registru").

[...] Elle a pensé au bilan provisoire de ce 20 mai : Jacques l'avait transférée dans un cagibi sans aucune forme de préavis et lui avait rattaché au nez, après avoir laissé entendre qu'elle l'insultait.

Elle a pensé que le 20 mai était le jour du chaos et de la violence et qu'il ne ressemblait en rien à celui qu'on lui avait prédit.

[...] Ŝi pensis pri la provizora bilanco de tiu 20^a de majo : Jacques translokis ŝin en tiun kameron sen ajna antaŭa informo, kaj abrupte malŝaltis, post ol afekti ke ŝi insultas lin.

Ŝi supozis ke la 20^a de majo estas la tago de la ĥaoso kaj de la violento, ke ĝi tute ne similas tiun kiun oni aŭguris al ŝi.

Komentoj :

La kvar unuaj substrekitaj verboj estas nerektaj formoj kun relativa tempo.

La lasta kun pluskvamperfekto (la aŭguro okazis antaŭe) al kiu respondas la preterito "aŭguris". Estas malfacile decidi ĉu tiu ĉi estas fakto (absoluta tempo) aŭ parto de la supozo (daŭrigo de la nereкта forma kun relativa tempo). Versajne pli taŭgas la unua alternativo. Feliĉe, ambaŭkaze bone funkcias la preterito.

Mathilde est plongée dans ses réflexions stratégiques depuis un moment lorsqu'une sorte de carillon lui annonce l'arrivée d'un mail dans sa boîte de réception. L'assistante du Directeur du Centre de Recherche lui envoie confirmation de son rendez-vous, ainsi qu'un plan d'accès au site. Le mail lui a été adressé avec une priorité haute, elle l'a remarqué tout de suite, elle en a été touchée.

Mathilde enmensis siajn strategiajn pripensojn de ioma momento, kiam son-alarmo anoncis la ricevon de ret-mesaĝo. La asistantino de la Direktoro de la Esplorado-Centro konfirmis ilian rendevuon, kun mapeto por aliri al la loko. La ret-mesaĝo estis adresita al ŝi kun alta prioritato, ŝi tuj rimarkis tion, ŝi estis kortuŝita pro tio.

Komentoj :

La franca teksto subite uzas la t.n. prezencon de rakonto (en ĉapitro en la estinteco). La preterito taŭgas en Esperanto.

La perfekto "a été adressé" ĝuste indikas antaŭecon. La uzo de "it" ("adresita") sufiĉas.

Le parfum capiteux de Corinne Santos semble avoir imprégné les meubles, la moquette et chaque centimètre cube d'air, comme si elle occupait ce bureau depuis la nuit des temps. [...] Et elle s'en veut de la haïr à ce point. D'avoir une telle envie de déchirer ses papiers, de défaire son chignon, de lui cracher au visage. Elle aimerait que de Corinne Santos soit plus minable encore, écoeurante de vulgarité, qu'elle accumule les erreurs, les gaffes et les méprises, qu'elle fasse preuve d'une incompetence spectaculaire, qu'on la surprenne avec Jacques dans une position évoquant singulièrement la fellation, que cela fasse le tour de l'entreprise en moins de deux heures, qu'ils deviennent tous les deux l'objet des plus perfides médisances. Elle aimerait que Corinne Santos se désintègre, là, devant ses yeux, qu'elle se dégonfle ou parte en poussière.

La ebriiga parfumo de Corinne Santos ŝajne sorbiĝis en la mebloj, en la tapiŝo kaj en ĉiu kubcentimetro de aero, kvazaŭ ŝi okupus tiun oficejon de praeterno. [...] Ŝi riproĉas sin ke ŝi malamas ŝin je tia grado. Ke ŝi tiom emus disŝiri ŝiajn paperojn, taŭzi ŝian hartuberon, alkraĉi al ŝia vizaĝo. Ŝi ŝatus ke Corinne Santos estu eĉ pli aĉa, naŭza pro sia vulgareco, ke ŝi akumulu la erarojn, la mallertaĵojn kaj la misaĵojn, ke ŝi elmontru nekredeblan malkompetentecon, ke oni surprizu ŝin kun Jacques en nekonvena pozicio klare elvokanta midzadon, ke tio ĉirkulu tra la entrepreno en malpli ol du horoj, ke ili ambaŭ fariĝu la objekto de la plej perfidaj klaĉadoj. Ŝi ŝatus ke Corinne Santos neniĝu, tie, antaŭ ŝiaj okuloj, ke ŝi malŝvelu aŭ pulvoriĝu.

Komentoj :

La imperfekto "occupait" havas signifon de kondicionalo.

La cetero estas sinsekvo de nerektaj formoj kun relativa tempo. Tiel la prezenco "malamas" anstataŭas la infinitivon, la kondicionalo (ago neesperebla) "emus" anstataŭas la infinitivon, kaj poste la volitivoj (forta deziro) anstataŭas la subjunktivojn.

[...] Il a expliqué au gardien qu'il était médecin et venait pour une consultation. L'homme refusait d'ouvrir. Il n'avait pas été prévenu. Seuls les visiteurs annoncés et disposant d'une place réservée à l'avance avaient accès au parking. Thibault s'est expliqué une nouvelle fois. Il n'en avait pas pour longtemps, il n'y avait aucun autre endroit où se garer à moins de cinq cents mètres. Il a pris la peine de respirer après chaque phrase pour ne pas s'énerver. Le gardien a refusé.

[...] Li klarigis al la gardisto ke li estas kuracisto kaj venas por konsulto. La viro rifuzis malfermi. Li ne estis avertita. Nur la vizitantoj anoncitaj kaj disponantaj lokon antaŭ-rezervitan povas parkumi. Thibault klarigis denove. Li ne bezonos multe da tempo, li ne povas parkumi ekstere je malpli ol kvincent metroj. Li klopodis spiri post ĉiu frazo por ne nervoziĝi. La gardisto rifuzis.

Komentoj :

La du unuaj substrekitaj verboj estas nerektaj formoj kun relativa tempo.

Poste sinsekvas faktoj en la preterito kun absoluta tempo ("rifuzis", "klarigis" kaj "klopodis") kaj duon-rektaj formoj kun relativa tempo ("estis avertita", "bezonos" kaj "povas").

Mais il ne supporte pas qu'on fasse l'ordonnance à sa place.

— Si vous permettez, je vais vous ausculter.

Sed li ne elportas ke oni faras la preskribon anstataŭ li.

— Permesu ke mi aŭskultumos vin.

Komentoj :

Du nerektaj formoj kun relativa tempo. Al la subjunktivo respondas la prezenco (“faras”). Pri la dua la formo estas rekta en la franca (baldaŭa futuro) kaj nereкта en Esperanto.

Il aimait ce moment quand la ville s'apaise, et le gémissement étrange de l'asphalte, à la nuit tombée, comme si la rue rendait sa violence contenue, son trop-plein d'affects.

Il lui semblait alors qu'il n'y avait rien de plus beau, de plus vertigineux que ce nombre.

Li ŝatis tiun momenton kiam la urbo paciĝas, kaj la strangan ĝemon de la asfalto, post la vesper-krepusko, kvazaŭ la strato liberigus sian retenitan violenton, sian tro-plenon da emocioj.

Tiam ŝajnis al li ke nenio estas pli bela, pli ebriiga ol tiu multeco.

Komentoj :

La imperfekto (“rendait”) havas sencon de kondicionalo.

Post la formo “ŝajni ke”, la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo “ŝajni”.

[...] Et puis les affiches se sont mêlées, confondues en une seule toile, mouvante, un kaléidoscope aux couleurs brillantes qui tournoyait autour d'elle. Elle a senti que son corps tanguait, elle a fermé les yeux.

[...] Kaj la afiŝoj miksiĝis, fandiĝis en ununuran bildon, moviĝantan, laŭ kalejdoskopo kun brilaj koloroj kiuj kirligiĝis ĉirkaŭ ŝi. Ŝi sentis ke ŝia korpo tangas, ŝi fermis la okulojn.

Komento :

Nereкта formo kun relativa tempo.

Ses jambes se dérobaient sous elle, très doucement. Elle tenait la carte du *Défenseur de l'Aube d'Argent* dans la main droite, il lui a semblé qu'elle s'appuyait sur lui, qu'il la portait.

Ŝiaj gamboj senfortiĝis sub ŝi, tre dolĉe. Ŝi tenis la karton de *La Defendanto de l' Arĝenta Krepusko* en sia dekstra mano, ŝajnis al ŝi ke ŝi apogas sin sur li, ke li subtenas ŝin.

Komento :

Post la formo "ŝajni ke", la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo "ŝajni".

Quand le métro est arrivé, Thibault s'est assis en face d'elle pour continuer de l'observer. Pourquoi cette femme occupait à ce point son attention, il n'aurait pas su le dire. [...]

Kiam alvenis la metroo, Thibault eksidis antaŭ ŝi por plu observi ŝin. Kial tiu virino tiagrade okupis lian atenton, tion li ne kapablis diri. [...]

Komento :

Ĉi-okaze oni uzu absolutan tempon. Sed se malestus la komplemento "tion" oni uzus relativan tempon ĉar la sindemando "Kial ..." estus nereкта formo ("Li ne kapablis diri kial tiu virino ..."). Nu estas vere ke en tiu aparta situacio, la elektita vojo ne estas unuforma en la tuta libro, interalie se la sindemando estus en kvazaŭ-rekta formo (vidu ĉi-antaŭe la alineon "Se konsidere ke la fido ...").

La femme évitait son regard. Il lui a semblé qu'elle devenait de plus en plus pâle, elle s'est redressée pour se tenir à la barre. Une dizaine de voyageurs sont montés à la station suivante, il a fallu relever son strapontin. Il a continué de la regarder et puis il s'est dit qu'il ne pouvait pas dévisager une femme de cette manière.

La virino evitis lian rigardon. Ŝajnis al li ke ŝi fariĝas pli kaj pli pala, ŝi rektiĝis por teni sin je la stango. Deko da vojaĝantoj eniris en la sekvanta stacio, necesis relevi la klap-seĝojn. Li daŭre rigardis ŝin kaj li supozis ke li ne povas fikse rigardi virinon tiamaniere.

Komentoj :

Post la formo “ŝajni ke”, la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo “ŝajni”.

La dua substrekita verbo “pouvait” estas nereкта formo kun relativa tempo (prezenco “povas”).

Pendant quelques minutes il a baissé les yeux. Il a pensé à son appartement, à la chaleur de l'alcool qui envahirait bientôt ses membres, au bain qu'il ferait couler un peu plus tard dans la soirée. Il a pensé qu'il ne pouvait plus faire marche arrière. Il avait quitté Lila. Il l'avait fait.

Dum kelkaj minutoj li mallevis la okulojn. Li pensis pri sia apartamento, pri la varmo de la alkoholo kiu baldaŭ invados liajn membrojn, pri la bano-akvo kiun li fluigos pli poste en la vespero. Li pensis ke li ne plu povas retroiri. Li forlasis Lila-n. Tion li ja faris.

Komentoj :

La kondicionaloj “envahirait” kaj “ferait” havas signifon de futuro, des pli ke ili estas sekvataj de “bientôt” kaj “un peu plus tard”.

Sekvas nereкта formo kun relativa tempo.

[...] Après quelques secondes il lui a semblé que le visage de la femme se modifiait, de manière imperceptible, même si rien n'avait bougé, rien du tout, se modifiait dans une forme d'étonnement ou d'abandon, il n'aurait pas su dire.

[...] Post kelkaj sekundoj, ŝajnis al li ke la vizaĝo de tiu virino modifiĝas, neperceptebla, eĉ se nenio moviĝis, absolute nenio, ĝi modifiĝas en specon de miro aŭ de rezignemo, tion li ne scipovus diri.

Komentoj :

Post la formo “ŝajni ke”, la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo “ŝajni”.

La preterito de la verbo “moviĝis” estas absoluta tempo.

La preterito de la kondicionalo (“n’aurait su dire”) estas ignorinda. La kondicionalo tie esprimas neblon.

Il lui a semblé que cette femme et lui partageaient le même épuisement, une absence à soi-même qui projetait le corps vers le sol. Il lui a semblé que cette femme et lui partageaient beaucoup de choses. [...]

Ŝajnis al li ke tiu virino kaj li partigas la saman elĉerpiĝon, foreston de si mem kiu alĵetas la korpon al la planko. Ŝajnis al li ke tiu virino kaj li partigas multajn aferojn. [...]

Komentoj :

Post la formo “ŝajni ke”, la verbo de la subpropozicio estas je la relativa tempo (PAG §270 (1)). Estas notinde ke la subpropozicio iel estas subjekto de la verbo “ŝajni”.

La prezenco (relativa tempo) ĉe “alĵetas” estas arbitra decido, ke la alĵeto estas parto de la ŝajno al li. Sintakse la formo “alĵetis” (absoluta tempo) estus eble pli konforma al la kutima normo.

Apendico

Kaŭzo kaj konsekvenco

Ĉi tiu fina apendico prezentas la diversajn manierojn esprimi la rilaton inter kaŭzo kaj konsekvenco. Ĉar **kaŭzo antaŭas konsekvencon**, ĝi trovas lokon en dokumento pri la tempo (en rilato kun la paragrafo « Esprimo de antaŭeco »).

Okaze de argumentado, debato, sinpravigo, ... nenio estas apriorie fakta, eĉ se riveliĝas logika dedukto. Estas do necese prezenti alternan sinsekvon de kaŭzoj kaj de konsekvencoj por ke la argumentado estu kohera kaj konvinka. Tial la frazoj fariĝas tiukaze pli ellaboritaj, ofte dupropoziciaj. En tiu tipo de esprimo, troviĝas pluraj subkategorioj (vidu la postajn paĝojn).

Krome, ofte estas konstateble ke multaj esperanto-uzantoj renkontas malfacilaĵojn por esprimi tiun specon de ideoj. Notindas la jenaj kutimaj konfuzoj : inter « pro » kaj « por » (sama vorto en la franca), inter « kvankam » kaj « tamen » (« pourtant » estas ofte ambigua en la franca), inter « ju pli » kaj « des pli » (oni ne distingas ilin en la franca ĉar la ordo estas fiksita), la timeto uzi la korelativojn « ial, tial, ... » kaj la inklino al uzo de la « pro tio ke » anst. « tial ke » aŭ simple « ĉar » eĉ kiam tio ne utilas. Notindas ankaŭ ke multaj ne sentas ke « tial ke » enkondukas kaŭzon dum « tial » reprezentas kaŭzon do enkondukas konsekvencon. Estas verŝajne ke simpla mensa pripenso de la kronologio (kaŭzo okazas antaŭ sia konsekvenco) helpus en la rego de tiuj esprimiloj kaj samokaze alportus rimedojn en la traduko de kelkaj verbo-formoj.

Antaŭ-noto : en ĉiu kategorio, la kursivaj vortoj estas ĉi-sube uzataj por enkonduki kaŭzon (unua listo) kaj la konsekvencon (dua listo). La kaŭzon mem simbolas "___". La konsekvencon simbolas "... ... ". La marko {} indikas ke neniu speciala vorto enkondukas la kaŭzon (resp. la konsekvencon), "*" ke enkonduka vorto ne absolute necesas.

La esprimo de la duopo kaŭzo-konsekvenco havas du formojn : la unupropozicia formo (indiko 1.) uzas prepoziciojn kaj la dupropozicia formo (indiko 2.) uzas kunjunkciojn, subjunkciojn, adverbojn.

1. Baza logiko

« *io vera implicas ion veran* » (*kio estas matematike vera*)

Strikte logika (matematiko, filozofio)

- | | | | |
|--|-------|---------------------------------|--------|
| 1. <i>pro, dank' al, ĉe, laŭ, konsekvence de</i> | _____ | <i>kaŭze de, *</i> | |
| 2. <i>ĉar, tial ke, ke, *</i> | _____ | <i>tial, konsekvence, do, *</i> | |

Pro la pluvo, la grundo estas malseka.

La grundo estas malseka ĉar pluvis.

Ĝeneraliga (biologio, botaniko, zoologio ; regulo)

- | | | | |
|---|-------|--------------|--------|
| 1. <i>ĉiu</i> | _____ | <i>estas</i> | |
| 2. <i>ĉiuokaze kiam, ĉiufoje kiam, ek de kiam</i> | _____ | <i>}</i> | |

Ĉiu grundo akvumita estas malseka.

Ĉiuokaze kiam pluvus, la grundo estas malseka.

Hipoteza / supoza (us) (esplorado, enketo ; pruvo per absurdo)

- | | | | |
|-------------------------|-------|----------|--------|
| 1. <i>supoze de</i> | _____ | <i>}</i> | |
| 2. <i>se, supoze ke</i> | _____ | <i>}</i> | |

Supoze de pluvo, la grundo estus malseka.

Se pluvus, la grundo estus malseka.

Kondiĉa (is / as / os) (antaŭ-studo ; pravigo de decido)

- | | | | |
|--------------------------|-------|----------|--------|
| 1. <i>kondiĉe de</i> | _____ | <i>}</i> | |
| 2. <i>se, kondiĉe ke</i> | _____ | <i>}</i> | |

Kondiĉe de pluvo, la grundo estos malseka.

Se pluvos, la grundo estos malseka.

Tempa / kronologia (kinematiko, aŭtomatiko)

- | | | | |
|-----------------------------|-------|--------------------|--------|
| 1. <i>post, sekve de, *</i> | _____ | <i>antaŭ</i> | |
| 2. <i>post (ol), *</i> | _____ | <i>antaŭ ol, *</i> | |

Post pluvo, la grundo estas malseka.

Post ol pluvus, la grundo estas malseka.

Cela (industrio, entrepreno ; projekto-procezo)

- | | | | |
|-------------|-------|---------------------------------------|--------|
| 1. <i>}</i> | _____ | <i>por, cele al, konverĝe al, ...</i> | |
| 2. <i>}</i> | _____ | <i>por ke</i> | |

La ĝardenisto akvumas cele al malsekigo de la grundo.

La ĝardenisto akvumas por ke la grundo estu malseka.

2. Mezura / analoga

«io ju pli vera implicas ion des pli veran » (malneta logiko)

Kvanta / kontinua (fiziko, termodinamiko, ĥemio ; mezuroj)

- | | | | |
|---------------------|-------|-------------------|--------|
| 1. <i>ju pli da</i> | _____ | <i>des pli da</i> | |
| 2. <i>ju pli</i> | _____ | <i>des pli</i> | |

Ju pli da akvo falos, des pli da legomoj kreskos.

Ju pli pluvos des pli rapide kreskos la plantoj.

Sinkrona / nekontinua / sojla (meĥaniko, elektroniko)

- | | | | |
|----------------------|-------|-----------|--------|
| 2. <i>tiel, tiom</i> | _____ | <i>ke</i> | |
|----------------------|-------|-----------|--------|

Li tiel akvumis ke ekkreskis la floroj.

3. Preteksta / kroma kaŭzo

«du aferoj veraj implicas saman veraĵon » (kio estas matematike vera)

Kroma / falsa kaŭzo (ĉiutaga vivo, debato, argumentado)

- | | | | |
|-------------------------------|-------|----------|--------|
| 1. <i>ne pro, ne dank' al</i> | _____ | <i>}</i> | |
| 2. <i>ne ĉar</i> | _____ | <i>}</i> | |

Ne pro pluvo la plantoj kreskis (sed pro sterko).

Ne ĉar pluvis la plantoj kreskis (sed pro dissemo de sterko).

Preteksta (ĉiutaga vivo, politiko)

- | | | | |
|------------------------|-------|----------|--------|
| 2. <i>pretekste ke</i> | _____ | <i>}</i> | |
|------------------------|-------|----------|--------|

Pretekste ke pluvis, li ne akvumis (fakte pro mallaboremo).

4. Malgraŭa / kontraŭ-logika

«io vera implicas ion malveran » (kio estas matematike malvera)

Malgraŭa, senkaŭza (ĉiutaga vivo, debato, politiko)

- | | | | |
|---|-------|--|--------|
| 1. <i>malgraŭ, spite' al</i> | _____ | <i>}</i> | |
| 2. <i>kvankam, malgraŭ ke, eĉ se, *</i> | _____ | <i>tamen, nu, sed,
dum, almenaŭ, *</i> | |

Malgraŭ la pluvo, la grundo estas seka.

Kvankam pluvis tamen la grundo estas seka.

Fatala / senespera

- | | | | |
|--------------------|-------|---------------------------------|--------|
| 2. <i>eĉ se, *</i> | _____ | <i>fine, neeviteble, fatale</i> | |
|--------------------|-------|---------------------------------|--------|

Eĉ se li akvumos kiel eble plej ofte, fine ne kreskos la plantoj.

Murfia (ĉiutage)

Se mi akvumos, certe pluvos tuj poste (kaj inverse se mi ne akvumos ne pluvos).

La diversajn problemojn koncerne la verbojn tiu dokumento ilustras per eltiraĵoj el la libro kaj de ĝia traduko en Esperanton :

« Les heures souterraines » romano verkita de Delphine de Vigan (eldono J.C. Lattès, 2009)

Prix du roman d'entreprise 2009

Prix des lecteurs de Corse 2010

« La horoj subteraj » tradukita de Christian Rivière (memeldono, 2014)

Referencoj :

Plena Analiza Gramatiko (Kálmán Kalocsay kaj Gaston Waringhien) :

§105 ĝis §112 kaj §116 pri la verbaj aspektoj kaj pri la kompleksaj formoj

§269 ĝis §271 pri la nerektaj formoj, tempo absoluta kaj relativa

Mi sincere dankas je :

Janine Dumoulin pro ŝiaj utilaj klarigoj koncerne la franclingvan gramatikon.

Michel Duc Goninaz pro liaj proponoj en la nomado de la tensoj de la franca lingvo.

Aliaj verkoj de Delphine de Vigan :

« Jour sans faim » (eldono Grasset, 2001)

« Les jolis garçons » (noveloj, eldono J.C. Lattès, 2005)

« Un soir de décembre » (eldono J.C. Lattès, 2005)

Prix St-Valentin 2006

« No et moi » (eldono J.C. Lattès, 2007)

Prix du Rotary International 2008

Prix des libraires 2008

« Rien ne s'oppose à la nuit » (eldono J.C. Lattès, 2011)

Prix du roman FNAC 2011

Prix du roman France Télévisions 2011

Prix Renaudot des lycéens 2011

Prix des lectrices de Elle 2012

« D'après une histoire vraie » (eldono J.C. Lattès, 2015)

Prix Goncourt des lycéens 2015

Prix Renaudot 2015